

V - 19479/35 (1966)

Bulgara

ESPERANTISTO



1966

9-10

ŜTATA KOTONA TEKSA KOMBINUMO „TUNGA“ EN URBO JAMBOL

PRODUKTAS:

altkvalitajn kotonajn ŝtofojn:

kvadratfigura „Totka“ — 80 cm.

fusteno „Iskâr“ — 70 cm.

fusteno „Vitoŝa“ — 70 cm.

kvadratfigura „Sportist“ — 70 cm.

kotonŝtofo „Asja“

nankeno k. a.

TELEFONOJ: Direktoro — 459, Ĉefingénieur — 13-10, Ĉefkontisto — 13-28

Ĉefo de la vendado — 10-03, Telefona centrejo — 258, 458, 976.

Kovrilpaĝo : La Ponto de la Amikeco sur Danubo ĉe Ruse

Abonkotizo : jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro ; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv ; korespond-anoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto ; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52, 4 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 10 —a.



NI PLIMULTIGU LA SUKCESOJN!

La plej granda parto de la nuna jaro jam forpasis. Ni komencis la trian kvaronjaron de 1966 — periodo tre grava kaj tre respondeca por nia fruktodona agado dum la sekvonta jaro.

Kio estas plej rimarkinda dum la pasinta 8-monata periodo? Oni povas aserti ke tiu periodo estis tre streĉa kaj enhavoriĉa.

Nia Asocio kaj la societoj en urboj kaj vilaĝoj aliĝis al la tutpopolaj klopodoj por la bona plenumado de la taskoj fiksitaj en la popolekonomia plano por 1966. Ni estas feliĉaj konstati, ke nia lando faris novan tre seriozan paŝon en sia evoluo dum la unua jaro de la nova kvina kvinjarplano. La lando ricevis abundan rikolton de la agrikultura masrtumo kaj tre bonajn rezultojn en la sfero de la industrio. La kultura vivo ankaŭ notis novajn sukcesojn. En la politika vivo rimarkinda fenomeno estis la parlamentaj balotoj en februaro, pri kiuj nia Asocio dissendis specialan cirkuleron rilate la patroprenon de la esperantistaro en tiu vastdemokratia manifestiĝo.

La plej vigla parto de niaj societoj organizis sian propran elektokampanjon, pritaksis sian unujaran agadon kaj ŝarĝis la novajn estrarojn per la gvidado de la societaj taskoj ĝis la nova elektokampanjo.

Tre rimarkinda sukceso estas ankaŭ la VII tutlanda junulara esperantista festivalo en urbo Loveĉ en la komenco de aprilo. Ĝi donis al BEJ kaj al la asocia estraro novajn impulsojn kaj ideojn rilate la estontan manieron de organizado de tiu tre grava manifestiĝo de E-movado en nia lando. Ne hazarde la okazinta en Sofio unua tutlanda E-konferenco (la 20-an de junio) pritraktis speciale la ĝisnunajn rezultojn kaj la estontan organizadon de la junularaj E-festivaloj.

Speciale oni devas noti la bonan laboron de la Unua STELO-kongreso, kiu okazis en Ruse. Nia esperantista studenta junularo havis la honoron kaj la respondecon esti dommastro kaj organizanto de tiu internacia studenta aranĝo kaj oni povas konstati kun ĝojo, ke en la ĉefaĵo kaj en multaj detaloj la kongreso de STELO estis el la plej rimarkindaj fenomenoj en la internacia E-movado. La loko ne permesas pli detalan analizon, sed oni povas diri tute trankvile, ke tiu kongreso eliris el siaj esperantistaj kadroj kaj fariĝis fenomeno prezentanta intereson por la vastaj neesperantistaj tavoloj de la bulgara popolo. La gazeto kaj la radio ĉiutage dum tuta semajno raportis pri ĝia laboro, kiu post la 48-a UK en Sofio ne havis precedencon.

Ĉar aliloke en la nuna numero oni raportas pri la partopreno de bulgara esperantistaro en la 51-a UK en Budapeŝto, en la 22-a TEJO-kongreso en Pécs kaj en la IV-a Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado en

Budapeŝto, ni tie ĉi nur notos, ke simila amasa partopreno en diversaj internaciaj esperantistaj aranĝoj flanke de bulgara esperantistaro okazis por unua fojo. Kaj tio ne estis hazarda ĉeesto de neorganizita amaso. La bulgara E-movado digne prezentis sin kaj donis valoron kaj konkretan kontribuon en la internicia E-vivo. Tio rilatas ankaŭ pri nia partopreno en la konferenco de la lernejoj en kiu Esperanto estas instruata (en Graz, Aŭstrio) kaj precipe pri la organizado de internacia laborbrigado de junaj esperantistoj (ĉ. 150 personoj) kiu laboris dum 20 tagoj en julio ĉi-jare apud la malnova bulgara ĉefurbo Veliko Târnovo.

La komencita en 1965 j. kampanjo por subskriboj sub la Peticio de UEA al UN estis kronita ĉi-jare per grandega sukceso, kiu vicigis nian E-movadon inter la unuaj en tiu tre grava internacia kampanjo. La bulgara esperantistaro donis bonan ekzemplon de organizita celkonscia laboro.

Jen mallonge la plej ĉefaj atingajoj de nia movado, de niaj societoj kaj apartaj membroj. Ili povas kaj devas inspiri nin al novaj sukcesoj. Kien ni devas direkti nian atenton dum la sekvonta kvarmonata periodo?

Unualoke ni devas memori, ke en la komenco de novembro okazos la IX kongreso de Bulgara Komunista Partio, sub kies gvidado floras kaj brile evoluas la tuta vivo en nia lando.

Kiel civitanoj de nia respubliko ni, la bulgaraj esperantistoj, sentas ĉiam la zorgojn de la Partio pri la bona estonteco de nia Patrio. Jen kial ni devas doni ankaŭ nian kontribuon en la realigado de la epokfarantaj planoj de BKP kaj la povo'a registaro. La esperantistoj devas honeste kaj sisteme partopreni en diversaj laboriniciativoj ĉu en la fabrikoj kaj vilaĝaj kooperativaj farmobienoj, ĉu en lernejoj kaj kvartaloj. Estas necese renkonti la partian kongreson per buketoj de laborsukcesoj. Krom tio, oni devas ligi tre intime la esperantistan movadon kun la ceteraj amasorganizaĵoj — precipe kun la lokaj pacdefendaj komitatoj kun la estraroj de popolaj legejoj en urboj kaj vilaĝoj. Tie ni trovos vastajn eblecojn por propagando de Esperanto por la نورلاj celoj de tiaj amasmovadoj. Tio kompreneble rilatas ankaŭ pri ĉiuj ceteraj amasorganizaĵoj — sindikataj, junulaj, abstinencaj, turistaj ktp. Precipe grava estas nia enhavoriĉa internacia korespondado — persona kaj grupa. Ĝi donas eblecon klarigi al niaj eksterlandaj amikoj la plej ĉefajn taskojn kaj la ricevitaĵajn rezultojn, kiujn metis antaŭ sin kaj realigis nia laborema popolo. La publikigita en la gazetaro projekto de la nova kvinjarplano (1965–1970), la opinioj kaj la proponoj farataj en ligo kun ĝi flanke de multaj specialistoj kaj aliaj civitanoj, la brila evoluo de nia lando skizita en tiu dokumento por nia plej proksima estonteco — ĉio-ĉi donas bonegan bazon por ĝusta kaj profunda informado de niaj fremdlandaj amikoj. Kompreneble, ni ne devas forgesi nian defortaskon — la aŭtunan kurslaboron por kreado de novaj esperantistoj aŭ por perfektigo de la ceteraj. La alta lingva nivelo estas tre necesa por ĉiu esperantisto. Fli zorgema organizado kaj instruado — jen la vojo al sukcesa kurslaboro dum la aŭtuna kaj vintra periodo. Ni speru, ke en la kursoj oni faros ankaŭ la necesan varblaboron por plifortigi la ekzistantajn kaj per formi novajn E-societojn kolektante samtempe abonojn por „Bulgara Esperantisto“ kaj aliaj esperantaj eldonaĵoj. Ju pli amasa kaj orta estas nia Asocio, ju pli stabila finance ĝi estos — des pli grandaj estos ankaŭ niaj estontaj sukcesoj.

N. Aleksiev



SUB LA IMPRESOJ DE LA 51-a UK

Ni ne troigas asertante, ke miloj da bulgaraj geesperantistoj strebis al la 51-a Universala E-kongreso. Kio allogis al Budapeŝto? Kompreneble, la mondfama grandurbo, situanta sur ambaŭ bordoj de Danubo. Ĉiu el ni revis promenadi sur la insulo Marget, trairi la mirindan ĉenponton Lanchid, admiri la arkitekturon de la Parlamentejo kaj la multnombrajn monumentojn, dissemitajn tra Peŝto, Budo kaj Obudo. Ni forte deziris supreniri la rokon Gellert kaj ĝui la panoramon, kiu prezentigos al niaj okuloj. La admirantoj de belartaĵoj trovos en la muzeoj verkojn de Hals kaj Goya, de Velazquez kaj El Greko, de Munkacsy kaj Laszlo Paal. La legantoj de originala belliteraturo sopiris vidi kaj alparoli la ŝatatan poeton kaj verkiston Julio Baghy okaze de lia 75-jariĝo, kiu kiel obstina kaj sindona pacbatalanto ankoraŭ donacas al ni pacinspiritajn versojn:

Venu, homfratoj, sekvu nin! Ni en-
tranĉu vojon

en pramalklero de la mondo
al pacportanta lumoondo. . .

Sendube la plimulto el la aspirantoj al la 51-a deziris renkonti en Budapeŝto siajn korespondantojn kaj malnovajn konatojn, babili kun ili kaj kune ĉeesti diversajn kunvenojn, kunsidojn kaj spektaklojn.

Do kiam venis lastaj tagoj de julio, pli ol 600 bulgaraj geesperantistoj (el ili 346 anticipe aliĝintaj) prenis la valizojn kaj ĉu karavane, ĉu unuope, rapidis kapti lokon en la vagonoj al okcidenta direkto. Pripensu nur, kara leganto, 600 personoj! Cifero sufiĉe impona, se oni komparas kun la 21-a UK, kiu en 1929 same okazis en Budapeŝto. Tiam el Bulgario veturis proksimume 150 personoj. Nun — la kvaroblo. Ĉu tio ne estas elokventa

fakto pri kresko de niaj vicoj?

Survoje al Hungario ni haltas dum unu tago en Beograd, kie amikece kaj kamaradece bonvenigas nin tieaj esperantistoj. Dum la solena kunveno sekvis reciprokaj salutoj, faritaj de N. Aleksiev kaj reprezentantoj de Jugoslavia E-Ligo, izraelaj kaj finlandaj esperantistoj. Tagmeze ni marŝis tra la ĉefstratoj de la ĉefurbo, altirante la atenton de la loĝantaro. De Kalemegdana fortikaĵo ni ĝuis posttagmeze la pitoreskan pejzaĝon de Danubo kaj Sava, kiuj ĉi tie brakumas la urbon.

Vespere kune kun jugoslaviaj kongresanoj ni daŭrigis nian vojon al la kongresurbo. La hungara lando bonvenigis nin per siaj verdantaj maizkampoj kaj ĝardenoj.

Frumatene je la 30-a de julio nin akceptis la stacidomo Keleti. De tie ni facile atingis la kongresejon, kiu okupas kvinetaĝan Doman de la konstrulaboristoj. Ĉie oni vidas ĵusalvenintojn, kiuj atakas la giĉetojn por pli rapide ricevi la menditan loĝejon.

LKK, gvidata de la ĉiam servoplena Bela Berceli disponigas al ĉiu loĝejon Ĝis la inaŭguro de la kongreso ĉirkaŭ kvin mil kongresanoj kaj gastoj havis sian liton.

La interkona vespero kaj la solena inaŭguro okazis en la vasta Petöfi-pavilono sur la foira teritorio. Oni longe kaj dankeme aplaudis la salutparoladon de Ödön Kishazi, vicprezidanto de la Hungara Popolrespubliko, kiu estas alta protektanto de la 51-a UK.

„La hungara registaro — parolis k-do Kishazi — elkore bonvenigas en nia lando ĉiun eksterlandan civitanon, kiu venas en nian patrujon por ekkoni nian popolon, ties kulturon, vivrimedojn, ke helpe de tiaj konoj ankaŭ li plifortigu la amikecon inter la nacioj, la pacan kunvivadon.“

Ni dankis per niaj aplaŭdoj ankaŭ al la ĉefurbestro de Budapeŝto k-do Istvan Sarlos, kiu salutis la kongreson en la nomo de la loĝantaro de la urbo. Li diris interalie: „La forto de tiu ĉi urbo estas en tio, ke en ĝi loĝas du milionoj da homoj, celantaj la progreson. Ni scias, ke ankaŭ la esperantistoj troviĝas en la unuaj vicoj de la batalantoj por la progreso“. Tial li esprimis deziron, ke E-movado fortiĝu kaj E. estu akceptita kiel oficiala lingvo.

Sekvis bonvenigo de la Prezidanto de LKK k-do Bela Berceli, kiu memorigis, ke pasis kvardek jaroj de tiu tempo, kiam en Budapeŝto okazis la 21-a UK. „Tiam aliĝis nur 1200, kaj nun aliĝis pli ol 4000 kongresanoj el pli ol 40 landoj, tial tiu ĉi kongreso estas la plej granda postmilita E-kongreso.“

Sekvis salutoj de la reprezentantoj de registaroj — Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Germana Demokratia Respubliko, Izraelio, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando kaj Svedio kaj de la naciaj E-organizaĵoj.

En sia festparolado Prof. Ivo Lapenna, Prezidanto de UEA, konkludis:

„En la komenco mi diris kelkajn vortojn pri Danubo. Permesu al mi en la fino denove mencii ĝin kaj fari komparon.

„Se ĝiaj akvoj estus limigitaj nur al la kvanto, ricevita ĉe la fonto, ĝi estus sensignifa, nekonata rivero, kiu verŝajne malaperus ie subtere, en iu lageto aŭ marĉo, aŭ eĉ sekiĝus dum sia fluado. Vi fariĝas ĉiam pli forta, ĉiam pli potenca, por fine atingi gigantajn dimensiojn, ĉar ĝin nutras centoj da aliaj riveroj kaj riveretoj.

„Tiel same alfluu al nia komuna UEA el ĉiuj flankoj, de dekstre kaj maldekstre, de oriento kaj okcidento, de nordo kaj sudo, ĉiuj pozitivaj fortetoj, kaj ni ŝtopu ĉiujn breĉojn por ne perdi eĉ unu el ili, ĉar nur tiel ĝi povos fariĝi tiel potenca, ke ĝi sukcesos

frakasi la lastajn rokegojn de antaŭjuĝoj, superstiĉoj kaj kontraŭstaroj, kaj povos konduki la Internacian Lingvon en majesta pompo, same kiel Danubo faras post la venko de Gerdap, al la fina celo — la ĝeneraligo de Internacia Lingvo por ĉiuj internaciaj rilatoj en la intereso de ĉiuj“.

Per tio la oficialaĵoj elĉerpiĝas. Nun la amaso intermiksiĝas. Zumas kiel giganta abelujo la pavilono Petöfi. Diverslandanoj premas la manojn unu al la alia, interŝanĝas impresojn. Novaj Esperantistoj provas siajn fortojn. Ili similas birdidojn, kiuj nun lernas flugi. . .

Dimanĉe posttagmeze la plej grava afero estas la inaŭguro de la Internacia Somera Universitato en salono, kiu portas la nomon de la fama pola espisto D-ro Kabe. La unua preleganto Prof. D-ro Ivo Lapenna parolis pri projekto de aŭtoraj rajtoj kun aparta konsidero al la Universala konvencio de Unesko. Pli ol 350 kongresanoj aŭdis la prelegon de Prof. D-ro E. A. Bokarev pri fonemo kaj sono en Esperanto. K-do J. Vranĉić prelegis pri moderna pentroarto. Prof. D-ro St. Ĝuĝev pri la antikva muziko en la folkloro de la balkanaj landoj. Preskaŭ ĉiutage, dum daŭris la kongreso, oni prelegis en ISU.

La teatroamatorojn allogis la varia kaj riĉenhava programo, preparita por la kongreso. Prezentis teatraĵojn la Internacia Arta Teatro, Teatro populara de Lodz kaj la Bulgara E-Teatro, kiu kelkfoje prezentis ĝajajn unuaktaĵojn de Elin Pelin, A. Ĉeĥov, Branislav Nuŝić kaj aliaj aŭtoroj. K-do Mihail Zdravov ĝojigis la kongresanojn per modernaj estradaj kantoj. Varme oni dankis al la gvidanto de Bulgara E-Teatro Kiril Draĵev.

Senpacience oni atendis la kunvenon de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kiu devis okazi je la unua de aŭgusto, posttagmeze. Salono „Privat“ akceptis kelkcent personojn. Prezidas

kamaradoj el diversaj landoj. La Prezidanto de MEM Nikola Aleksiev legas la raporton pri la internacia situacio kaj la taskoj de MEM. Li substrekis, ke la kontraŭstaro al la militanta imperiismo postulas unuecon de ĉiuj pacamaj esperantistoj. Fortaj aplaŭdoj subtenas lian alvokon. Li vipas la barbarajn krimojn de usonaj militistoj en Vjetnamio kaj fratece salutas la bravan popolon, kiu firme kaj senŝancele defendas sian landon.



La veteranoj J. Baghy kaj Prof. Pechan

Pri la organizaj aferoj en MEM raportas k-do Anton Balague, ĝenerala sekretario de MEM. Lia raporto paroligas multajn ĉeestantojn. Parolas k-do Podkaminer el Leningrado, Ivan Canev el Bulgario, D-ro Marton el Hungario. Ĉiuj unuanime deklaras, ke MEM faras utilan laboron en la vicoj de esperantistoj.

Venas la kulmina momento. Japana pacbatalantino enportas verdan standardon, desegnititan per la subskriboj de japanaj MEM-anoj. Per grandaj literoj la standardo vokas: „Tuj retiriĝu usonaj agresantoj el Vjetnamio!“ La ĉeestantaro forte aprobas ĉi sloganon. La japana MEM-anino transdonas la

standardon al la prezidanto de MEM Nikola Aleksiev. En la salono sonas koleraĵoj: „For la agresantojn! Vivu la vjetnama popolo!“ Ĉiuj ekstaras por honori la vjetnamajn esperantistojn. Je la nomo de Ito Saburo, ĝenerala sekretario de Japana sekcio de MEM, la reprezentanto de japana MEM protestas kontraŭ s-ro H. W. Holmes, kiu pasintjare en Tokio konfiskis tute senrajte similan verdan standardon, kaj postulas ĝian redonon. Longaj aplaŭdoj subtenas la postulon de la japanaj amikoj.

En la sama tago okazis la elekto de nova komitato de MEM, kiu konsistas el 23 personoj, elstaraj pacbatalantoj en Sovet-Unio, Hungario, Aŭstrio, Francio, Ĉeĥoslovakio, Vjetnamio, Svedio, Japanio, Italio, Pollando kaj Britio. El nia lando eniras la komitaton de MEM N. Aleksiev, Tinka Lakova kaj Momĉo Momĉev. Unuanime oni reelektas kiel prezidanton k-do N. Aleksiev. La Kvara MEM-konferenco restas por ĉiam en nia memoro pro ĝia unuanimeco kaj batalspirito.

Rekorda nombro vizitis ankaŭ la kunvenon de virinoj. K-dino Borbala Szeremi-Toth prelegis pri la taskoj de la esperantistinoj en la batalo por paco. En la diskutoj alparolis ankaŭ bulgaraj esperantistinoj. Tre plaĉis al la ĉeestantaj virinoj la luksa eldono de „Bulgario“, kiun disvastigis k-dino Trajana Petkova.

Alternas la kongrestagoj, koincidas programeroj. Kunsidas ĵurnalistoj, ŝakludantoj, sciencistoj, agrikulturaj specialistoj, fervojistoj, pedagogoj, juristoj, medicinistoj, turistoj. Bulgaroj partoprenas ĉie, partoprenas la diskutojn.

La kongresvesperojn oni dediĉas al la teatraĵoj. Centoj da kongresanoj eni-

ras la salonojn de nacia teatro Madach, de la kulturdomo kaj de la opereatro. Ĉiuj estas kontentaj pri la elekto de la teatraĵoj. Kun granda simpatio oni salutis la originale verkitan en E. teatraĵon de f-ino M. Boulton „Ĉu esti aŭ ne esti?“

Ĵaŭde, en la tago de la ekskurso, la ekskurso servo prizorgis ampleksan programon. „Kion vi preferas?—demandas ĉarma fraŭlino.—Ekskurso „A“ okazos perŝipe, ekskurso „B“ kondukos vin al Balatono, kie vi povus vin bani“. . .

Ni aŭskultas ŝiajn klarigojn pri ekskursoj al Kecskemet kaj Miskolc-grotoj kaj decidiĝas por ekskurso „A“. Ĝi kostas malplimulte kaj ebligas al ni vidi la Danubkurbiĝojn.

Do frumatene ni rapidas al la haveno. Bela ŝipo atendas nin. Iuj grumbas, ĉar neniuj konjektis ornamojn ĝin per verda flago. . .

600 personoj okupas la ŝipon. Ĉie svarmas verda popolo. Dum la ŝipo fendas la ondojn, ni ĝuas la pejzaĝon. Fekunda estas la tero, kiun ni vidas de sur la ferdeko. . .

Ni navigas norden, preter koketaj urbetoj, kies loĝantoj amike svingas per manoj kaj ĉapeloj.

Iom post iom la ŝipo eniras montaran regionon, nomatan „Danubkurbiĝoj“. De malproksime ni rekonas turojn de kasteloj — nestoj de mezepokaj nobeloj.

Proksimiĝas tagmezo. Ni navigas al la ĉelima urbo Estergom—iama restadejo de hungaraj reĝoj. La haveno renkontas nin per verdaj standardoj kaj bonvenigaj sloganoj. Salutas nin la urbestro. Oni dividas nin en grupojn, por pli rapide konatiĝi kun la urbo.

Sur altaĵo, de kie oni vidas la ĉeĥoslovakian ebenaĵon, staras modesta baziliko. Ĝia interno estas vidinda pro siaj valoraj murpentraĵoj. En la reĝa palaco, nun artgalerio, ni trovas valorajn artaĵojn: ikonojn, bildojn de mondfamaj pentristoj, kiuj majeste pentris homajn ĝojojn kaj malĝojojn. . .

Malfrue en la nokto ni revenas en Budapeŝton.

La ekskurso servo bone plenumis sian taskon, doninte al 1,500 kongresanoj la eblon konatiĝi kun vidindaĵoj de la hungara lando.

Sekvas ankoraŭ du streĉaj tagoj — kunsidoj, kunvenoj. Pritraktas siajn aferojn poŝtistoj, ruĝkrucanoj, naturamiko. Vendrede posttagmeze oni inaŭguras la parkon Esperanto. 500 kongresanoj trairas la Elizabeta-ponton. K-do N. Aleksiev salutis la reprezentantojn de la urbo kaj dankis al ili por tiu ĉi iniciato.

Vendrede vespere la Petöfi-pavilono allogis milojn da kongresanoj, por ĉeesti la plej interesan el la kongresaj artaj aranĝoj. Sur la podio eliras ciganorkestro Rajko, kiu impresis nin neforgeseble. Alternis antaŭ ni virtutoj-violonludantoj en aĝo de 18—20 jaroj, eĉ unu 12 jaraĝa. Ĉarmis nin la kantisto Imre Bojtor kaj la kantistino Katerina Madarasz, kiu kantis ankaŭ en E. Ravis nin ankaŭ la danckolektivo de tutlanda Junulara Asocio. En popolaj kostumoj ili dancis, konigante al ni la hungaran folkloron. Kantoj, dancoj kaj violonsono — jen la plej bela danco de niaj hungaraj amikoj. Tiam bukedon da artistoj oni ĝis la vivofino memoras. . .

Venis la lasta kongrestago. Pluvetas, tamen tio ne malhelpas la aliron al la Petöfi-pavilono. Kelkaj miloj da homoj babilas, serĉas pli oportunan lokon. Al la podio sin direktas LKK-anoj kaj la Estraro de UEA. Ekestas silento, ĉiuj rigardoj direktas sin al la ĝenerala sekretario de UEA s-ro G. Bäcker, kiu raportas pri la plej gravaj decidoj, faritaj dum la estraraj kaj komitataj kunsidoj.

La prezidanto de UEA proponas akcepton de kelkaj rezolucioj adresitaj al la Unuigintaj Nacioj kaj ĉiuj ŝtatoj — membroj de UNO. La kongreso aprobas la rezoluciojn.

S-ro Tonkin raportis pri la kongreso

de TEJO, kiu okazis en Pécs kaj estis la plej granda kongreso ĝis nun. Poste li informas pri la rezultoj de la oratora konkurso.

La prezidanto de la Akademio s-ro Waringhien informas pri la rezultoj de la Belarta konkurso. Dum oni disdonas la diplomojn la kongresanoj kun aplaŭdo salutas la ĉeestantajn premiitojn. Fine li mencias la sukcesojn de la Bulgara E-Teatro.

Laŭ propono de s-ro Carlén, vicprezidanto de UEA, la kongreso unuanime dankas al ĉiuj LKK-anoj kiel ankaŭ al la multaj helpantoj de LKK. Ĉiuj virinoj ricevas bukedojn.

Ankoraŭ unu solena momento. Ĉe la tribuno ekstaras la prezidanto de LKK k-do Bela Berceli kaj la izraela esp-isto Prof. Cohen-Cedek, kiu invitas al la 52-a UK en Tel-Aviv. Bela Berceli simbole transdonas la kongresan flagon al la prezidanto de LKK de la 52, s-ro Cohen-Cedek.

Nun ekkantas la himnon s-ro Carlén kaj la kongresanaro sekvas lin. Kantas junaj kaj maljunaj, pioniroj kaj komen-cantoj. . . „La espero“, verkita antaŭ jardekoj, estas la plej bona pacrezo-

lucio, kiun aprobis la kongreso.

Prof. D-ro Ivo Lapenna deklaras la kongreson fermita. Sed la kongresanoj ne rapidas disigi. Oni interparolas, promesas rekontiĝi en Tel-Aviv. . .

Ni jam preparas nin por forveturo, sed en la lasta posttagmezo ni rapidas vidi la Nacian Muzeon, la preĝejon Matiaso, la fortikaĵon. Ankoraŭfoje ni marŝas tra la ĉefstratoj de la urbo — bulvaroj Lenin, Rakoci kaj Popola Respubliko. . .

En la lasta momento k-do Antal Koos surprizis nin — li kondukas nin al la roko Gellert. Estas antaŭ nokto-mezo. Ĉirkaŭ la monumento de la Soveta Armeo ni trovas esperantistojn el Sovet-Unio, Nederlando, Hispanio kaj Ĉeĥoslovakio. Ĉiuj egale admiras la ornamajn lumilojn, kiuj speguliĝas sur la akvoj de Danubo.

Adiaŭ, Budapeŝto! Adiaŭ, hungaraj amikoj! Vi estos tro lacaj kiel gastigantoj, tamen memoru, ke ni estas tre dankemaj al vi, ĉar vi donis al ni la eblecon konatiĝi kun via lando kaj via progresema popolo.

Hr.

LOGIKA REPLIKO

Amiko demandis min:

— Kial vi estas esperantisto?

Ekrigardinte lin de la kapo ĝis la piedoj, mi ne respondis rekte, sed demandis lin ridetante:

— Kial vi estas homo, kaj ne besto?

Pripensinte iom, li diris:

— Mi ja naskiĝis tia kaj mi fieras, ĉar la homo estas la plej supera el ĉiuj vivaj estaĵoj.

— Jes, vi prave diris, sed vi scias ankaŭ, ke humanisto estas pli supera ol ordinara homo.

— Kompreneble — respondis li.

Tiam mi klarigis al li plue:

— Do vi devas scii, ke esperantisto estas antaŭ ĉio humanisto. Krom tio,

ĉiu esperantisto estas humanisto, sed ne ĉiu humanisto estas esperantisto. Sekve — la esperantisto estas pli supera ol ordinara humanisto; la esperantisto havas ankaŭ alian avantaĝon — li posedas ankoraŭ unu atributon de nobleco kaj homamo, aplikante en la vivo mem la plej efikan interfratigilon kaj interkomprenilon — la internacian lingvon Esperanto. La esperantistoj fervore kontribuas ankaŭ por la tutmonda paco kaj por la konstanta interŝanĝo de valoraĵoj en la sfero de la kulturo, la belartoj kaj la scienco.

Mi esperas, ke vi jam komprenas kial mi estas esperantisto.

D. Nikolov
Kazanlâk

(kunveno en la Kongresejo [en Salono UNESKO])

Ĉeestis entute 40 geesperantistoj el Hungario, Pollando, Rumanio kaj GDR.

D-ro Dezső Szilágyi, direktoro de Ŝtata Pupteatro (Hungario) informis la ĉeestantojn, ke la Universala Asocio de Pupteatroj, UNIMA pritaksos Esperanton, kiel oficialan lingvon de mondasocio dum la sekvonta ĝenerala kunveno de UNIMA (mallongigo de Mondasocio de Pupteatroj) okazonta en Berlin (orienta), laŭ lia propono. La ĉefsekretario de UNIMA salutis kun granda ĝojo la iniciatantan laboron de Hungara Ŝtata Pupteatro koncerne Esperanton dum la ĝenerala kunveno de UNIMA okazinta en Budapeŝto en septembro 1965.

S-ino Anna Bánd raportis pri la unua prezentado (Esperante) de Ŝtata Pupteatro dum la 51-a UK.



Reĝisorino en la Ŝtata Pupa Teatro en Budapeŝto



E-kurso en la Ŝtata Pupa Teatro en Budapeŝto

Faris proponojn koncerne al la pupteatra fako s-ro Rudolf Hahlbohm el Orienta Berlin (Ŝtata Pupteatro) kaj s-ino Julia Sigmond rilate al la gazetservo por la internacia pupetfako (Rumana

Ŝtata Pupteatro). F-ino Elizabeta Regöci (Hungario, aktorino kaj oficistino de HEA) koncerne al la efektiviĝo de Esperanto-Internacia Pupteatra Fako. Okazis preparoloj, alparoloj rilate al la supremenciitaj proponoj.

Oni decidis ke Budapeŝto estu la centro de Internacia Pupteatro. Dum la kunveno fondiĝis la Estraro de Pupteatroj: D-ro Dezső Szilágyi, direktoro de Ŝtata Pupteatro (Hungario) — prezidanto; S-ino Anna Bánd, reĝisorino de Ŝtata Pupteatro — vicprezidantino; S-ro Rudolf Hahlbohm (Ŝtata Pupteatro en Orienta Berlin) — vicprezidanto; Elizabeta Regöci, aktorino kaj laboristino ĉe la oficejo de Hungara E-Asocio — sekretario; S-ro Robert Bánki, aktoro (Ŝtata Pupteatro, Hungario) — vicsekretario; F-ino Julia Sigmond, aktorino ĉe la Ŝtata Pupteatro en Hungario — propagandistino.

Centro de Internacia Ligo de Esperantistoj-Pupistoj — Budapeŝto VI, Népköztársaság utja 69, Ŝtata Pupteatro Allami Bánszínház, Hungario.

KUNSIDO DE LA ESPERANTISTOJ-JURISTOJ EN BUDAPEŜTO

Dum la 51-a Universala Esperanto-Kongreso en Budapeŝto okazis aktiva kunveno de la esperantistoj-juristoj.

Reprezentantoj de naŭ landoj, inkluzive Bulgario, prelegis je temo:

„La principo de egaleco de ambaŭ seksoj en la familia juro de diversaj landoj.“

La prelegoj koncernis gravajn problemojn de la familia juro.

Bulgario estis reprezentita de Genčo Genčov, advokato el Sofia.

En la kadroj de la 51-a UK en Budapeŝto okazis la VII virina E-konferenco. La konferencon partoprenis pli ol 300 virinoj el diversaj landoj. Ĉeestis la esperantistinoj el USSR, Bulgario, Pollando, Francio, Danlando, Italio, Nederlando, Usono, Grekio, Jugoslavio kaj el aliaj landoj.

1. La ĉeestantoj ĝuis la belajn E-kantojn de la ĥoro de la Bulgara E-turista Sekcio en Sofio, kaj la dancojn de la sama danctrupa.

Raportis Borbala Seremi Toth. Ŝia raporto „La avangardo de la virinoj“ estis interesa. Interalie ŝi parolis pri la devo de la virinoj esperantistinoj gardi la pacon, defendi la feliĉan estontecon de la infanoj, de la familioj.

Pri la laboro de la bulgaraj virinoj esperantistinoj raportis k-dino L. Bojaĝieva. Tre varme parolis Marĵorí Boulton — fama esperantistino verkistino. Ŝi citis la eldiron de la knabineto kiu kun la infana grupo salutis la virinan konferencon.

Fino Boulton diris, ke la estonteco devas aparteni al la infanoj. Pro tio nia devo estas konservi la pacon. Unuanime la virina konferenco decidis batali

por paco. Ĉiuj virinoj kondamnis la usonan agreson en Vjetnamio kaj petas ke oni ĉesigu la militon kontraŭ la vjetnama popolo. La voĉdonita rezolucio kontraŭ la usona milito en Vjetnamio ilustras la volon de la virinoj esperantistinoj el pli ol 40 landoj por batali por la paco.

Posttagmeze la hungara Virina komitato akceptis oficiale po unu aŭ du reprezentantinoj el diversaj landoj, kiuj partoprenis la konferencon.

La Prezidantino de H. V. K. k-dino Erdcé Zaszloné salutis la virinojn. Ŝi estis kortuŝita de la batalpreteco de la virinoj el diversaj landoj parolantaj Esperanton. Ŝi diris, ke admiras la esperantistinojn kiuj laboras por la komprenigo inter la popoloj, kiuj laboras por la internacia solidareco, kontraŭ la milito.

La feston partoprenis ankaŭ k-dino Ztándor Vera kiu respondecas pri la internaciaj ligoj ĉe la H. V. K. Ŝi promesis ke H. V. K. pritraktos la demandon por pli vasta kontakto kun la hungaraj esperantistinoj — kun INEVKOM

Tr. Petkova

BRIGADANA VESPERO

Ĉiu urbo en nia lando estas famekonata per iu parkloko. Sliven per „Karamdila“, Stara Zagora — per parko „Lenin“, Kjustendil — per „Ĥisarlâka“, Pleven — per „Kajlâka“ kaj Jambol — per „Borovec“ — belega popola parko.

En tiu ĉarma loko E-societo „Maksim Gorkij“ organizis brigadan vesperon je la 29-a de junio.

La geesperantistoj el Jambol ŝvingis sian flagon antaŭ la loĝantoj de la urbo. Ĝi estas ellaborita de nia aktiva samideanino Katja Kamburova.

La veterano de la brigadana movado k-do Petr Ĝinĉev, instrukciisto ĉe Patrolanda Fronto, rakontis siajn rememorojn. Antaŭ 20 ja-

roj li estis brigadano, kiel 17-jara junulo. Por plenumi siajn tagnormojn vespere li laboris kiam aliaj dormis. Tie li komencis verki kaj nun li estas unu el la plej bonaj verkistoj en Jambol.

Kun atento kaj intereso la partoprenintoj aŭskultis lin.

Poste li deklamis sian verkon.

K-do D. Trudoljubov, prezidanto de E-societo, dankis al k-do Ĝinĉev pri la belegaj rememoroj.

Ĝis malfrue ĉiuj kantis, rakontis, ridis.

Nia amiko Panĉo Sivov, ŝoforo, promesis frumatene per la urba aŭtobuso veturigi ĉiujn brigadanojn.

Todorka Tonĉeva

MARTIRINO AKUZAS. . .

de Hrima

Dediĉita al la usona esperantistino
Alice Herz, kiu bruligis sin por
manifesti sian proteston kontraŭ la
agresa milito de usonaj imperiistoj
en Vjetnamio.

Ordinara mateno en Vaŝingtono:
en avenu' „Pensilvanio“ aŭtoj svarmas;
limuzino rapidas al Pentagono —
en ĝi sidas la ĉefo mem Maknamara.

Kabineton li eniras kaj tuj telefonas
al dommastro Johnson en la Blanka Domo:
— Bombtapiŝis hieraŭ vilaĝojn novajn
niaj bravaj pilotoj — fier' usona. . .

Prezidanto esprimis al Maknamara
sian koran dankemon kaj lin invitas
dum vespero ĉeesti en hejm' kampara
spiritistan prezenton animeksitan.

Maknamara kontente frotas la manojn:
„Ĉi-vespere postulos mi de li donacon
por raketoj kaj aviadil' dolarojn,
Vjetkongo nur tiel ja kapitulacos!

La balkonon alpaŝis ĉef' de Pentagono,
panoramon ĝueti de Potomako. . .

Sed atenton altiras la fera ponto,
kie torĉo ekflamas — virin' ia en jako.

Maknamara — aŭtor' de amasaj murdoj
telefonas tuj al la gardistar'-cerbero.
Baldaŭ venas respo do: „Ja sen perforto
sin bruligis virino kun verda stelo. . .“

Spiritistoj kunsidas en nigra ĉambro.
Prezidanto avertas: — Nun Linkoln venos. . .
Ho miraklo! Aperas virin' en flamoj,
en la mano steleton ŝi verdan tenas. . .

Tra la flamoj radias okuloj ŝiaj,
kun kolero sonoras la voĉ' virina:
— Vin preparu, sinjoroj, por juĝ' popola, —
testamento al homoj mi lasas tian. . .

Transkapiĝas la gastoj de l' prezidanto. . .
— Lumon! Lumon! — kriegas ĉef' Pentagona.
Lumo venis elektra, sed la voĉ' proklamas:
— Mi akuzas murdistojn el la Blanka Domo!

REKVIEMO

de Nikolaj Hristozov

al Goĉo Grozev

Foriras vi,
maljunaj komunistoj,
vi ja foriras en surpriza hor'.
Solece,
kiel malfruiĝintaj pafoj
kaj apud ni eksplodas via kor'.
Foriras vi —
kaj, apenaŭ tiam
vin vidas la popolo kun jubil'.
Subiras vi —
kaj tiam nur ekflamas
de via vivo la legend' en bril'.
Kaj jen ni
kun alarmo silentema
fiksrigardas,

sentinte per la sarg',
ke io tuj foriras senrevene,
de l' mondo io velkas — grava mank'.
Ke iĝas malproksima kaj malklara
de via justbatalo spita
la alarm'.
forbrulas pace la avertaj fajroj,
forĝesitaj
signaloj mutas jam.
Kaj kun fier' forpasas la kolonoj. . .
Kaj en la adiaŭa mortsilent'
de la altaĵoj

venas la estonto
kaj niajn ŝultrojn ĝi obsedas jen.

Tradukis: At. Lakov

JUBILEO DE HILDA DREZEN

AL LA POETINO

de K. Gusev

En la memora galerio bilda
inter vizaĝoj karaj mil kaj mil
neforgesebla staras nia Hilda,
modeste milda, preskaŭ ĝis humil'.

Sed havas multe tiu ĉi humil' da
fervoro, vervo, firmo de armil',
kaj ŝiaj versoj — vesto vere Ŝilda,
protektos majan verdon dum jarmil'.

Pro ŝia energio kaj bonfaroj
ne povas ŝin oldigi sepdek jaroj —
ŝi ĉiujn nin junigos per poem'.

Ŝi ravis nin dum tuta esto nia
per floroj de ĝardeno estonia,
per sentoj freŝaj kiel floro mem. . .

El „Por la paco“ V, Moskvo, 1966

LAŬ VEREŜĈAGIN

de Ivan Marinov

Trankvil' sur Ŝipka regas paca,
batala flag' ne flirtas eĉ.

Ripozas la soldatoj lacaj
sub la mantel' de dika neĝ'.

Rigardas fikse la kanonoj,
gardanto kiel sur posten'

kontraŭe en l' arbara zono.
Kaj hurlas frostiganta vent' . . .

La pint' de nia frata gloro,
kun frunt' de tiu blanksavan'
starigas monumenton fore,
samkiel fingro de gigant' —
por la generaci' memore!

Tradukis: Dinko Ŝiŝkov

VERSOJ ELEKTITAJ de Sergej Esenin

El la rusa tradukis K. Gusev, I. Hoves, S. Rublov kaj H. Drezen.

Eldono de Komisiono pri Internaciaj ligoj de
sovetaĵ esperantistoj.
Moskvo, 1965 j.

Antaŭ la dua mondmilito ni havis la feliĉon
legi en Esperanto poemojn de Majakovski.
Nun niaj sovetaĵ amikoj donacis al ni perlojn
el la trezoro de alia rusa poeto — Sergej
Esenin.

Naskita en 1895 j. en gubernio de Rjazanj,
Sergej Esenin lernis ĝis sia 14 jaro, post kio
komencis mem perlabori sian panon, kiel hel-
plaboristo ĉe komerca firmao kaj kiel korekti-
sto en Moskva presejo. Samtempe dum sia
libera tempo li konatiĝis kun la verkoj de
famaj rusaj poetoj kaj verkistoj, ekz. Al. Blok,
S. Gorodecki, A. Belij, M. Gorkij.

La grandan Oktobran revolucion Esenin ren-
kontis kun iom da kamparaneca koncepto, kiel
li mem skribis.

En la jaro 1916 aperis lia unua verslibro.
Per tio komenciĝis lia vojo de talenta rusa
poeto. M. Gorkij nomis lin „Admirinda poeto
de Rjazanj“.

En la epoko de estiĝo de soveta literaturo,
Esenin okupis apartan lokon. Li elektis senre-
zerve la vojon de la Revolucio. En la perso-

neco de Lenin li vidis kapitanon, kiu direktas
la ŝipon de la Revolucio. En „Ŝipestro de la
Tero“ li kantas pri Lenin.

Ankoraŭ ja
Neniu gvidis Mondon,
Kaj mi neniun kantis.
Sole li,
La manon
Etendinte en estonton,
La mondon nomis
Unu famili'.

Kiom da mildaj sentoj en la „Letero al la
patrino“! Kiom da amo al la rusa naturo en
„Betuloj“!

Kvardek jaroj depost la morto de la poeto,
sed liaj versoj ne maljuniĝas. Liaj versaĵoj
estas ŝatataj ankaŭ de la juna generacio en
Sovet-Unio. La sovetaĵ libroeldonejoj eldonas la
verkojn de Esenin en granda kvanto.

La traduko laŭ nia pritakso estas fidela al la
originalo. Ĉiuj versaĵoj kaj poemoj estas maj-
stre tradukitaj. Ni fieras iom pri nia lingvo,
konstatante, ke ĝi taŭgas por la esprimo de
plej mildaj sentoj. Ni kore dankas al la tra-
dukintoj, kiuj liveras per tio al ni veran este-
tikan plezuron.

Ni varme rekomendas al niaj legantoj legi
la poemaron de Esenin.

Ĥr.

I-a KONGRESO DE STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO (STELO)

Nia bela ĉedanuba urbo Ruse ĉi-somere estis ĉefurbo de la internacia Esperanto-studentaro. De la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1966 ĉi tie okazis la Unua Kongreso de STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo). Junularaj delegitaroj el pli ol 17 landoj partoprenis la Kongreson, kiu lasis plej bonajn impresojn en ili. Dank' al la bona antaŭpreparo fare de la Organiza Komitato kaj diversaj neesperantaj organizoj la Kongreso sukcese povis plenumi ĉiujn erojn de sia varia kaj interesa programo.

Antaŭ la oficiala malfermo de la Kongreso la 10-an de aŭgusto je la 18-a estis organizita gazetista intervju konferenco en restoracio „Dunav“ por la loka kaj centra ĵurnalistaro.



La 11-an de aŭgusto je la 10-a okazis la solena inaŭguro. En la granda salono de la Supera Instituto por Mekanikigo kaj Elektrifikigo de la Vilaĝmastrumoj (VIMESS), kiu estis plena de junaj studentoj-esperantistoj, inter la oficialaj gastoj estis la honora prezidanto de la Kongreso kamarado Ganĉo Ganĉev — ministro de la Klerigado, Petr Danailov — ĉefa sekretario de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio, Ivan Stanev — prezidanto de la Distrikta Popola Soveto, Raŝko Raŝkov — prezidanto de la Nacia Studenta Konsilio, Donka Kovaĉeva — prezidantino de la Organiza Komitato k. a.

La Kongreson malfermis la prezidanto de STELO inĝ. Jordan Kazakov, post kio ĝi estis saluita de la honora prezidanto ministro Ganĉo Ganĉev kaj aliaj oficialaj reprezentantoj.

Poste la kongresanoj faris antaŭ la kongresejo komunan foton.

Posttagmeze je la 15-a okazis la unua kunsido de la Komitato de STELO. Raporto pri la ĝisnuna agado de la Estraro faris la ĝenerala sekretario Adrian Boldan. Pri la raporto okazis interesaj diskutoj. La sovetiaj esperantistoj, kiuj por unua fojo partoprenas similan aranĝon de STELO, detale informis pri sia agado en urboj kaj universitatoj de Sovet-Unio. La Komitato decidis la studenta bulteno de STELO „Studento“ pro manko de bonaj kondiĉoj por ĝia kvalita eldono kaj kun la konsento de prof. Boĵa Popoviĉ, ĝenerala sekretario de ISAE, devas eniri la paĝojn de la bulteno de ISAE.

Dum la aliaj kunsidoj estis pritraktitaj diversaj organizaj demandoj por la estonta agado de STELO. Grava problemo, kiun pritraktis la Komitato, estis la projekto de Kontrakto por kunlaboro inter STELO, TEJO kaj ISAE.

Interesan raporton faris Andreo Grzebowski pri la agado de la Scienca Komisiono de STELO. Li emfazis la atingojn de la studentoj-esperantistoj sur la kampo de la scienco kaj ilia partopreno en du plej gravaj aranĝoj: Internacia scienca seminario en Torun kaj Studenta scienca sesio en Budapeŝto, dum kiuj estis faritaj respektive 16 kaj 6 sciencaj raportoj. La Komitato vigle diskutis la sciencan agadon kaj akceptis gravajn decidojn pri la estonta agado de STELO, kiu porestante devas okupi plej gravan lokon en la agado de STELO.

La lasta kunsido okazis la 14-an de aŭgusto. Dum ĝi estis akceptita nova plano por laboro dum 1966/1967. Estis faritaj kelkaj ŝanĝoj en la Statuto de STELO. La Komitato akceptis la proponon de la pola delegacio ke la II-a STELO-Kongreso okazu en Pollando kaj de la franca delegacio ke la III-a Kongreso okazu en Francio. Per sekreta balotado estis elektita nova Estraro de STELO: inĝ. Jordan Kazakov (Bulgario) — prezidanto, Gabriel Ivanov (Bulgario) — vicprezidanto, Adrian Boldan (Rumanio) — ĝenerala sekretario, Claude Neurmont (Francio) — kasistino, Adam Pavlukovec (Sovet-Unio) — kultura agado, Halina Dastych (Pollando) — scienca agado kaj Bela Gellen (Hungario) — informo fako.

Krom la oficiala organiza agado en la kadro

de la Kongreso estis organizitaj multaj aranĝoj, kiuj celis varligi la restadon de la kongresanoj kaj konatigi ilin kun la urbo kaj ĝiaj loĝantoj, kun ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

Tre interesa estis la bulgara folkloro vespero, kiu ĝuigis la gastojn per la beleco kaj la vigleco de la bulgaraj popolaj kantoj kaj dancoj.

La kongresanoj vizitis kelkajn muzeojn de la urbo kaj la Artan Galerion. Per aŭtobusoj ili promenis tra la pitoreska arbarparko „Lipnik“. Multaj faris ekskurson al nia antikva ĉefurbo Veliko Tŕrnovo, kie estis renkontitaj de la lokaj esperantistoj, kiuj promenis ilin sur la historiaj altaĵoj Trapezica kaj Carevec, montris al ili aliajn vidindaĵojn de la antikva urbo.

Sur la ludplacoj de la Supera Instituto (VIMESS) okazis sportaj konkuradoj inter la kongresanoj kaj multaj partoprenis la tranaĝadon de Danubo.

La 13-an vespere estis organizita mitingo por paco kaj amikeco, kiun partoprenis ne nur la kongresanoj, sed ankaŭ multaj gejunuloj de la urbo. Parolis multaj gastoj el eksterlando, kiuj tuŝis gravajn demandojn de la internacia situacio, esprimis sian solidarecon kun la batalanta vjetnama popolo. Post la mitingo estis projekciitaj esperantaj filmoj por la loĝantaro. La saman vesperon okazis granda „Danuba vespero“ — perŝipa promenado tra Danubo, organizita de la Urba Komitato de Komsomolo. Dum la agrabla promenado la pola grupo plenumis interesan programon.

La 15-an okazis Internacia vespero, dum kiu amatoraj grupoj el Sovet-Unio, Pollando, Francio kaj aliaj landoj plenumis apartajn naciajn programojn.

Same okazis la tradicia Oratora Konkurso laŭ anticipe anoncitaj temoj. Unuan lokon gajnis Roberto Groneweld (Nederlando).

La lastan tagon de la Kongreso la junaj



esperantistoj vizitis per specialaj aŭtobusoj multajn vilaĝmastrumojn kaj entrepenejojn. Ĉie ili estis akceptitaj per floroj, kantoj kaj gaja bonhumoro. Multaj eksterlandaj studentoj vizitis privatajn domojn de kooperativanoj. Kun granda admiro poste ili dividis siajn impresojn pri la granda progreso de la bulgara vilaĝo, pri la sincera gastameco de niaj vilaĝanoj. La gastoj el la kapitalismaj landoj estis surprizitaj pro la malkonformo de la imagoj, kiujn enplantis en ilin ilia gazetaro, kaj la reala situacio en nia vilaĝo. Ili mem diris, ke la nerealaj imagoj pri Bulgario kaj nia popolo estas detruitaj kaj ne plu ekzistas.

Sur ilia loko aperis novaj realaj kaj veraj imagoj pri nia gastama kaj laborema popolo. Ili sincere promesis, ke reveninte en siajn landojn, ili nepre rakontu pri ĉio ĉi.

Post la fermo de la I-a STELO-Kongreso en Ruse multaj gekongresanoj direktiĝis al la Nigra Maro kaj al la internaj partoj de la lando por ĝui la belecon kaj la sunon de nia patrujo.

La junaj studentoj-esperantistoj disiĝis promesante denove renkontiĝi en 1967-a dum la II-a STELO-Kongreso en Pollando.

ing. J. Kazakov
N. Uzunov

TEJO

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Centra oficejo: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam — 2, Nederlando.

Historio: TEJO (origina nomo TJO) naskiĝis en 1938 okaze de la I-a Internacia Junulara Kunveno en Nederlando. La Dua Mondmilito preskaŭ complete detruis la organizon. En 1956 okazis reorganizo; TEJO aliĝis al UEA (Universala Esperanto-Asocio) kiel ĝia junulara sekcio.

Celoj: La organizo celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo pere de:

1. disvastigo de Esperanto inter la junularo;
2. enkonduko de Esperanto en la lernejojn;
3. praktika utiligo de la Internacia Lingvo je servo al la junularo;
4. okazigo de internaciaj junularaj kunvenoj.

TEJO estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.

Strukturo: Hodiaŭ TEJO ampleksas preskaŭ 10,000 membrojn en ĉ. 50 landoj. Estas individuaj kaj asociaj membroj. TEJO havas Landajn Sekciojn (LS) en Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Anglio, Bulgario, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Madagaskaro, Nederlando, Pollando, Sud-Koreo, Svedio, Svisio, Usono, Kanado.

La organizon direktas Komitato, kiu enhavas reprezentantojn de LS kaj aliaj organizaĵoj

(ekz. de STELO).

Agado: Ĉiujare TEJO organizas sian Internacian Junularan Kongreson, kiun kutime ĉeestas centoj da gejunuloj de 13 ĝis 25-jaraj el la tuta mondo. TEJO publikigas sian kvaronjaran revuon „Kontakto“, kiu pritraktas aferojn je ĝenerala intereso por la junularo. La organizajn aferojn publikigas „La Juna Vivo“, parto de la Internacia Revuo „Esperanto“. En „Heroldo de Esperanto“ aperas TEJO-rubriko. La LS havas proprajn agadprogramojn, ofte siajn gazetojn, kunvenojn ktp.

* * *

Nederlanda Esperanto-Junularo

Unu el la novealiĝintaj al TEJO Landaj-Sekcioj, kiu jam nombras 37 membrojn. Malgraŭ nemultnombra, ĝi tamen montras ambician antaŭeniradon. Okazis multaj amasaj aranĝoj, k. e. Semajnofino pri Informado al la ekstera mondo. La E-Rondo en Amsterdam ĉiulunde kunvenas, okazigas prelegojn pri „Historio de Esperanto, de ĝia movado kaj literaturo“ k. a. Ĉefaj gvidantoj: R. C. Groeneveld kaj Aŝvinikumar.

La plej sukcesa lastatempe estis la Konferenco de NEJ, okazinta en urbo Arnhem en

la Junulargastejo. Ĉefa temo: „Lokaj Grupoj“. Jen la plej interesaj eroj: farso „Varbklopodoj por NEJ“; belarta festivalo (kantemuloj gaje kantis kaj oni pentris abstraktajn pentraĵojn); filmoj kaj koloraj diapozitivoj de S-ro R. Kwantes pri pasintaj E-Kongresoj; festpromenado al Vondelpark, diskutado pri praktika enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn. NEJ havis dumtempe estrarkunvenon kaj aprobis sian statuton.

R.C. Groeneveld
Sekretario de NEJ

KALEJDOSKOPO DE NIAJ KUNLABORANTOJ

Zap oroĝje. Aperis juna „frato“ de la presorgano de BEJ „Juna Esperantisto“, organo de la kreata Soveta Junulara Esperanto-Organizaĵo — SEJM. Antaŭ nelonge en la urba Palaco de metalurgiistoj estis organizita ekspozicio kun

solena kunveno, dediĉitaj al la Esperanta literaturo. Anoj de la junulara E-Klubo „Kamelo“ pretigas sin por partopreno en la 22-a IJK en Pécs, STELO-Kongreso en Ruse.

Daniel Kolker

ENLANDA JUNULARA AGADO

Sofio. Bonege pasis la ekzameno por supera kono de Esperanto en la kurso de la studento Nikolaj Mihajlov, gvidata en mezgrada lernejo. El ĉiuj ekzamenitoj 6 ricevis bonegan poenton „6“, 3 — „5.5“, 3 — tre bone „5“ kaj unu — bone „4“. Faris ĝojigan impreson la detalaj konoj de la gelernantoj pri la gramatiko, la trafikaj tradukoj, la optimisma decido de ĉiuj prezenti sin kiel eble pli sukcese. La ekzamenkomisiono gratulis la ekzamenitojn kaj unuavice salutis ilian kursgvidanton, kies laboro rikoltis riĉajn atingojn. La plej bone parolantaj Esperanton tuj aliĝis al la Internacia labor-

brigado de BEJ en Veliko Târnovo ĉ. j., aliaj — al la 22-a TEJO-Kongreso en Pécs.

Okaze de la jarkunveno de SSES „Vela Peeva“ kaj kiel kontribuo al la Kampanjo „1965 — Jaro de la Bulgara esperantista junularo“ estas preta la traduko en Esperanto de la novelo „La ŝtelisto de persikoj“ fare de kolektivo de la Scienca studenta rondo en konsisto: Nikolaj Uzunov, Petr Todorov kaj Dimitr Jdrakov. Antaŭstaras ĝia redaktado kaj eldono. Laŭ la sama temo oni produktis filmon (bulgara-jugoslava) kun la populara bulgara kinoaktorino Nevena Kokanova.

URBA NACIA KOMITATO en Revnice — Praha, Zapad, Ĉeĥoslovakio, sendis leteron kun varmaj bondeziroj okaze de la Unua de Majo

kaj proponas ĝemeliĝon kun urbo Sofio aŭ kun iu el ĝiaj distriktoj aŭ kun alia urbo en Bulgario. Do, oni devas pripensi la proponon kaj akcepti ĝin.



ORGANIZA VIVO

STARA ZAGORA.— E-societo „Verda Stelo“ organizis en junio kunvenon, en kiu Ing. Dobri Dobrev prelegis pri „Cibernetiko“. Li tre komplete klarigis la interesan temon.

La 12-an de julio estis organizita kunveno dediĉita al Soveta Uzbekio. K-do Petko Bonev faris prelegon pri la vivo, kulturaj kaj ekonomiaj atingoj de tiu lando. Estis farita speciala agittabulo de uzbekaj bildkartoj. Pere de la Uzbeka Asocio de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj la kunveno sendis leteron al la E-Komisiono.

En la sama kunveno oni akceptis societan laborplanon por la tria trimonato 1966.

Irina Markova



Distrikta E-konferenco en Stara Zagora

БУРГАС. На 11. V. т. г. ентузиазирани есперантисти в Нефтохимическия комбинат се събрахме и учредихме Е-дружество „Пламък“ (Flamo).

За председател бе избран членът на ЦК на БЕС д-р. Ганчо Ганчев.

И ние ще дадем нашия принос за осъществяване задачите и целите на БЕС.

Иван Стоименов

KUBRAT. Je la 17-a de aŭgusto 1966 j. en Kubrat alvenis la du francaj fratinoj el urbo Gveriany — Frangoise kaj Marie Hélène invitaj de la E-societo por gastoj al ni.

Ni renkontis ilin en la ŝtata semoprodukta mastrumo apud la urbo. Al ili ni montris la purigadon de bonkvalitaj semoj. La gastinoj vizitis ankaŭ la akvomelon-kulturejon.

Ni vizitis ankaŭ du elementajn lernejojn, la Domon de la Junpioniroj kaj interŝanĝis opiniojn kun bulgaraj instruistoj.

La geesperantistoj kaj la junlara aktivularo promenis la gastinojn, oni faris fotojn.

La saman vesperon en restoracio „Moskvo“ la prezidanto de E-societo gratulis la gastinojn. Ĝis malfrue oni konversaciis kaj interŝanĝis adresojn.

Kubrat estas malgranda urbo, sed ĝin ofte vizitadas eksterlandaj esperantistoj. Per tio ni faras propagandon por Esperanto.

Marin Deskov

prezidanto de E-societo

LA ESPERANTO—TENDARO EN DRUJEVO

Ankaŭ ĉi-jare E-tendaro en Drujevo donis siajn pozitivajn rezultojn. Ekde la 6-a ĝis la 20-a de julio sub la sperta gvidado de Simeon Hesapĉiev, laboris persiste kaj profitodone po 6 homoj ĉiutage II-a grupo — plejparte progresintoj.

Ni regule faris tradukojn, serĉis kaj trovis la plej taŭgajn frazojn, per disputado ĝustigis la veron. Por tio precipe kontribuis la vida instruado de la gvidanto. Tiu metodo instigis al agoran vidmemoron. Ni forgesos neniam

la lecionojn, kiam k-do Hesapĉiev instruis al ni kun plenaj manoj — kraĵoj, kajeroj, kretoj, bildoj. Tre sukcesaj estis la lecionoj, kiam ni rakontis laŭ bildoj. Ni devis rakonti ankaŭ pri tio, kio mankis en la bildo, sed kion ni povas subkompreni. La bildoj instigis nin al krea imago. Ni havis grandan utilon ankaŭ de la kantoj, kiujn ni lernis — „Silezia popola kanto“, „Printempo“, „Hej Lili“, „Sankta Lucia“, k. a. Ili proksimigis nin al la poezio, pri kiu Kalocsay skribas: „... Zamen-

hof sciis, ke nur la poezio povas spiri vivon en la argilfiguron de la verko, nur ĝi povas fari el grizaj vortoj, enuaj reguloj, sekaj skemoj, vere vivan estaĵon, en kiu oni mire rimarkas la pulsadon de l' vivo“.

La panoramo ĉirkaŭ la tendaro estas pitoreska kaj grandioza, la aero estas freŝa, regas silento kaj trankvileco. La kondiĉoj por studado en la tendaro estas plibonigitaj kaj la vivmaniero — pliriĉigita.

La tendaro estas elektroprovizita, ĝi havas radioricevilon, gramofonon. Por la

familioj estas apartaj memstaraj ĉambroj.

Entute la tendaro, per ankoraŭ kelkaj aldonaj plibonigoj (konstruo de klasĉambro ĉiufланke fermita) povas fariĝi nia ripozejo kaj tie oni perfektigos en la lingvo.

Ĉiuj esperantistoj vizitintaj la tendaron alte pritaksas ĝian pedagogian karakteron kaj pro tio ni ne ĉesos propagandi ke pli da esperantistoj devas viziti ĝin.

Mario Deskov

(prezidanto de E-societo en Kubrat)

DU SEMAJNOJN EN DRUJEVO

La unua kursano, kun kiu mi konatiĝis elirante el la vagonaro ĉe stacidomo Lakatnik, estis Ivan Stranski el Pazarĝik. Ke li estis esperantisto montris la verda steleto, kiu brilis sur lia brusto. Evidentiĝis, ke li estas malnova esperantisto, ke li scias multe da vortoj, sed pri la gramatiko li scias preskaŭ nenion. Li veturis al Druĵevo por lerni detalojn pri la lingvo kaj plibonigis sian kvalifikon kiel estonta kursgvidanto.

Ĉe la aŭtostacio ni konatiĝis kun la gvidanto de la kursoj Simeon Ĥesapĉiev kaj ankaŭ kun kelkaj aliaj esperantistoj, kiujn la vagonaro veturigis el diversaj regionoj de la lando. Sur la rokoj ni vidis modestan monumenton, konstruitan por honorigo de la herooj de la Septembra Ribelo en 1923.

Ne post longa tempo ni alvenis unue en vilaĝon Milanovo kaj poste en vilaĝon Druĵevo. Sed ankaŭ en tiu ĉi vilaĝeto oni sentas la novan vivon. Tie ĉi kaj tie sur la ruĝaj tegmentoj oni vidas televidajn antenojn. La afabla ŝoforo haltigis la aŭtobuson antaŭ la enirejo de la tendaro, kiu troviĝas ĉirkaŭ 200 metrojn malproksime de la vilaĝo. Tuj kiam ni eniris la tendaron, ni sentis la bonodoron de antaŭ nelonge falĉita herbo.

Sur la centra loko kiel hirundo staras bela, unuetaĝa domo. Sur ĝia antaŭa muro altiras la rigardon granda verda stelo. En la domo estas dormejo, kancelario de la gvidanto, biblioteko kun pli ol 120 libroj. Maldekstre estas la kuirejo. Proksime apud ĝi estas la klasĉambro. Iom pli supre estas la deponejo. Norde apud la tendaro mem estas rokoj kun interesaj grotoj. Ĉe la bazo de la montosupro, en pina arbareto, esperantistoj faris aleon, kiun oni nomis „Aleo Zamenhof“. Apud la aleo troviĝas la akvokaptejo de la tendaro. Proksime estas montosupro Sokolec. La klimato estas bona kaj malgraŭ ke estas monato julio, la vetero estis malvarmeta. La aero, kiun ni enspiris, estis freŝa kaj pura. Estis silento kiel en praarbaro.

Ĉe tiaj kondiĉoj, sub la gvidado de Ĥesapĉiev ni studis la kursan programon sukcese. La diversaj pedagogiaj rimedoj, la kolektiva kaj individua partopreno ĉe la studado donis bonajn rezultojn. Vespere ni kantis esperantajn kantojn, rakontis interesajn okazintaĵojn, deklamis patriotismajn versaĵojn. Samtempe kun nia studlaboro ĉiutage ni laboris por plibonigi kaj plibeligi nian E-tendaron. Ĉiu esperantisto faris sian kontribuon por la komuna afero. Ĉi tie



ne mankis ankaŭ radioricevilo kaj gramofono kun gramofondiskoj en Esperanto.

En daŭro de du semajnoj ni praktikis la lingvon kaj ni fariĝis pli spertaj esperantistoj. Ni jam estas bonaj amikoj kaj Kvankam niaj profesioj estas plej diversaj, niaj sentoj kaj pensoj estas

Maria Vasileva Pipeva el Smoljan, aktiva Esperantistino, studas diligente lecionojn en sia amata loko en E-tendaro en Druĵevo. Ŝi ricevis plej altajn poentojn en la E-ekzameno.

Pipeva instruas la lingvon en la PorInstruista Instituto de Smoljan.

egalaj. En la tendaro la novaj kaj la malnovaj esperantistoj ricevas multon por sia perfektigo, por sia kvalifiko. Tie kreiĝas aktivularo de E-movado en Bulgarujo. Tion bone komprenis Marija Pipeva el Smoljan kaj Simeon Paunov el Pernik, kiuj por dua fojo pasigis sian ripozon en Druĵevo. La kursanoj estis tre kontentaj kaj kelkaj el ili diris, ke dum la sekvonta jaro ili denove ripozos kaj studos en Druĵevo.

La ekzamena komisiono estis tre kontenta pri la respondoj de la kursanoj.

Nesentible la tagoj forpasis kaj en iu frua mateno la aŭtobuso veturigis nin al la fervoja stacio Lakatnik. Atendas nin persista laboro kaj ni semos senlace la semojn de la amikeco kaj de la paco inter la popoloj.

Georgi Petrov

ESPERANTO-SOCIETO „RADIO“ EN PAZARĜIK FUNEBAS

Post mallonga malsano je la 6-a de junio forpasis la meritplena nia samideano **Dimitr Jakimov Dimitrov**. Li naskiĝis la 15-an de junio 1909 j. en Pazarĝik. Dimitrov estis laboristo, sed lia scivolemo estis granda kaj lia ĝenerala kulturo konsiderinda, precipe post 1932, kiam li estiĝis esperantisto. Li aktive korespondis kun esperantistoj el Brazilo, Germanio, Francio, Italio, Pollando, Svedio, Norvegio, Nederlando. Al kelkaj el ili li konstante aranĝis abonon al „Nuntempa Bulgario“. Li

partoprenis en du universalaj E-kongresoj — en Hungario — 1929 kaj en Pollando — 1959.

Tute neatendite je la 20-a de junio forpasis nia samideano **Dimitrija Ivanova Angelova**, 62-jaraĝa. Per sia bonanimeco ŝi gajnis amikojn por Esperanto inter la neesperantistoj kaj ĉiam favoris la grandan aktivecon de sia filo — multjara kasisto de nia societo.

Eterna estu la memoro pri tiuj niaj societanoj.

P. Arnaudov

La 3-an de julio 1966 en Sofio mortis

IVANKA GEDOVA

eksa gimnazia instruistino, membrino de la instruista E-klubo, sindona esperantistino.

Niajn kondolencojn al ŝiaj gefamilianoj.

La 29-an de aprilo 1966 en Burgas mortis

IVAN MOMČILOV RAŠEV

aktiva kaj sindona esperantisto, membro de E-societo „Nigra Maro“, instruistopensiulo.

Niajn kondolencojn al lia familio.

BULGARAJ VERBOJ KUN LA PRONOMO *CE*

En la bulgara lingvo per la resenda (refleksiva) pronomo **ce**, kiu respondas al la esperanta **si(n)**, estas formataj kelkaj specoj de verboj aŭ de verbovoĉoj kun malsamaj sencoj: resendaj (възвратни), pasivaj (страдателни), reciprok(ag)aj (взаимни), senpersonaj (sensubjektaj — безлични, безподложни) kaj medialaj (средни). Tiu ĉi diversa uzado de **ce** en iuj kazoj kongruas kun la uzado de la respektivaj resendaj pronomoj en aliaj lingvoj, en aliaj kazoj — ne. Same ne ĉiam la uzo de **ce** en bulgara lingvo kongruas kun la uzo de **si(n)**, en Esperanto.

Por la bulgaraj esperantistoj (kaj speciale por la novaj kaj por la nun lernantaj la Internacian Lingvon) estus utile koni la sencon de la bulgaraj **ce**-verboj kaj la diferencon de uzado inter ili kaj la verboj kun **si(n)** en Esperanto.

Tiucele nun ni faros revuon de la bulgaraj **ce**-verboj.

Resendaj verboj. En la bulgara lingvo (same kiel en la ceteraj slavaj lingvoj), la pronomo **ce** estas uzata por ĉiuj personoj de la verbo, dum en Esperanto **sin** estas uzata nur en la 3-a persono (kiel cetere estas en la latinidaj kaj germanaj lingvoj):

мия ce	mi lavas min
миеш ce	vi lavas vin
мие ce	li (ŝi, ĝi) lavas sin
мием ce	ni lavas nin
миете ce	vi lavas vin
мият ce	ili lavas sin

Novaj bulgaraj esperantistoj iufoje uzas en Esperanto erare **sin** en la formoj de 1-a kaj 2-a personoj (mi lavas **sin**¹⁾).

En la bulgaraj resendaj verboj oni povas anstataŭigi **ce** per **себе си**: мия **ce** = мия **себе си**. En la dua es-

primo ordinare oni sentas emfazon de la resendeco (en Esperanto proksimume: mi lavas min mem), t. e. por akcenti, ke ne **aliun**, sed **sin mem** oni lavas. Konsideru, ke tia anstataŭigo per себе си estas ebla nur ĉe resendaj verboj kaj tiu ebleco permesas kontroli ĉu iu verbo apartenas al la resendaj aŭ al iu alia grupo de **ce**-verboj.

Pasivaj verboj (pasiva voĉo). Ekzemploj:

От това място се вижда цялото село — De tiu ĉi loko (punkto) estas vidata la tuta vilaĝo.¹⁾

Списанието се чете от много есперантисти — La gazeto estas legata de multaj esperantistoj.

Есперанто се говори във всички материци — Esperanto estas parolata en ĉiuj kontinentoj.

Pri tiu uzado de **ce**-verboj ni povas fari la sekvantajn rimarkojn:

1. Ĉe ili oni ne povas anstataŭigi **ce** per себе си (oni ne povas diri селото вижда себе си, списанието чете себе си, есперанто говори себе си).

2. En bulgara lingvo estas aplikebla ankaŭ la helpa verbo **бивам** en similaj okazoj: мъртвите не се погребват, а се изгарят = мъртвите не биват погребвани, а биват изгаряни — la mortintoj ne estas enterigataj, sed bruligataj (aŭ: oni ne enterigas, sed bruligas la mortintojn). Tamen la uzo de **бивам** estas sentata tre „libreca“ (literatura) kaj en la konversacia lingvo ordinare estas evitata.

3. Kiel oni vidas, en Esperanto la bulgaran pasivon oni povas esprimi per la helpverbo „esti“ plus pasiva participo (esti vidata), aŭ per transformigo de la pasiva voĉo de la verbo en aktivan, uzante kiel subjekton la nedifi-

¹⁾ Similan eraran uzon mi havis okazon rimarki ankaŭ ĉe iuj nespertaj rusaj esperantistoj.

¹⁾ La donita bulgara esprimo havas ankaŭ nuancan signifon: estas videbla (oni povas vidi la vilaĝon).

nan pronomon **oni**: oni vidas, oni parolas. (Ĉe tia transformigo la subjekto de la pasiva verbo fariĝas en la nova propozicio objekta komplemento: vilaĝo — vilaĝon, gazeto — gazeton, Esperanto — Esperanton). Do, la supre donitaj ekzemploj povas havi en Esperanto ankaŭ tiajn formojn:

De tiu ĉi loko oni vidas la tutan vilaĝon. Multaj esperantistoj legas la gazeton. En ĉiuj kontinentoj oni parolas Esperanton.

Tiu ĉi maniero de transdono de la bulgara pasivo en Esperanto estas plej rekomendinda; ĝi kaŭzas nenian dubon pri gramatika reguleco, pri logikeco kaj klareco.

4. Por esprimi la sencon de **resendaj** kaj same de **pasivaj** verboj en Esperanto oni povas uzi ankaŭ la sufikson **iĝ**: vidiĝas, legiĝas, paroliĝas. Tiu ĉi sufikso estas **neŭtrala** rilate al la resendeco aŭ la pasiveco de la verboj; ĝi simple montras, ke je la subjekto de la propozicio fariĝas, okazas tio, kion esprimas la radikoj de la verbo, senkonsidere al tio, kiu kaŭzas ĝin — ĉu la subjekto mem al si aŭ iu alia, ekstera faktoro. La nomita sufikso havas ankaŭ senco de transiro en novan staton, en kiu ĝismomente la subjekto ne estis (precipe en kunmeto kun adjektivaj radikoj: puriĝi = ekesti pura, transiri en staton, karakterizan per „pur“; ĉe verbaj radikoj: kuŝiĝi = ekuŝi, transiri en kuŝan staton, sidiĝi = eksidi, transiri en sidan staton).

En tiu ĉi rilato la uzado de **ce** egale en la resendaj kaj en la pasivaj verboj en bulgara lingvo kongruas kun la uzado de la Esperanta **iĝ** por ambaŭ kazoj.

5. Spe cialan kazon en Esperanto prezentas la esprimo **trovi sin** (= troviĝi). Sendube ĝi eniris sub la influo de la eŭropaj lingvoj (inkluzive la slavajn), sed ĝi ne povas esti logika: dirante, ke „en mia skribotablo **sin trovas** kvar tirkestoĵ“, certe ni ne dezirus kompre-

ni aŭ komprenigi, ke la tirkestoĵ **trovas sin mem** en la skribotablo; tie oni trovas aŭ povas trovi ilin. Tiu ĉi esprimo, benita de la Fundamento (la Ekzercaro), meritas pli detalan pritrakton, sed tion ni faros alifoje.

Reciprok(ag)aj verboj en la bulgara lingvo laŭforme estas egalaj al la resendaj kaj la pasivaj, sed havas apartan senco: ili esprimas agon, kiun faras pluraj (plej ofte du) personoj reciproke, inter si, unu al la alia: **срещаме се всеки ден** — ni renkontas nin ĉiutage, **от тогава те не се поздравяват** — de tiam ili plu ne (**inter**)salutas sin. En tiaj esprimoj ankaŭ ni ne povus anstataŭigi **ce** per **себе си**; ni ne volas diri, ke ili (aŭ ĉiu el ili) ne salutas **sin mem**, sed ĉiu el ili ne salutas la ceteran; ni renkontas nin = ni renkontas unu la alian. Anstataŭ **sin** oni povas uzi ankaŭ tie ĉi la sufikson **iĝ**: renkontiĝi, salutiĝi ks.

Senpersonaj verboj. Tie ĉi ni ne traktas tiujn senpersonajn verbojn, kiuj esprimas meteorologiajn fenomenojn (**вали—pluvas, грми—tondras, светка се—fulmas** ks.), sed verbojn en esprimoj, kiaj: **на сянка се спи хубаво** — sub ombro oni dormas bone, **не трябва да се яде прекалено** — oni ne devas **manĝi** tro multe ktp. Ankaŭ en similaj esprimoj **ce** ne povas esti anstataŭata de **себе си**. Kiel ni vidas, en Esperanto la konvena formo por tiaj bulgaraj verboj estas **oni** + verbo; la uzo de **iĝ** ne estas rekomendinda, kaj **sin** povas esti aplikata en neniu okazo.

Medialaj verboj formas apartan grupon de la **ce**—verboj en bulgara lingvo, kiuj laŭ formo egalas al la ceteraj grupoj, traktitaj supre, sed sence estas tre diferencaj de ili. Tiaj estas: **боя се, плаша се (страхувам се)** — timi, **радвам се—ĝoji, чудя се** — miri, **възхищавам се** — admiri, **ядосвам се** — koleri, **смея се** — ridi, **възмущавам се** — indigni, **подигравам се** — moki, **разхождам се** — promeni ktp. Ankaŭ ĉi tie **ce** ne povas

anstataŭigi per **себе си** (не: боя себе си, чюдя себе си ktp.). Kiel ni vidas, en la respektivaj Esperantaj verboj ne aperas la bulgara **се**. Tion devas bone ekmemori kaj ĉiam priatenti la bulgaraj esperantistoj. Erare estus diri **mi miriĝas** aŭ **mi miras min**, por esprimi чюдя се, nek **mi timiĝas**, **mi promeniĝas**, **mi indigniĝas** ktp. La medialaj verboj esprimas staton, kiun havas aŭ travivas la subjekto. Por formi el la respektivaj Esperantaj verboj (timi, miri, promeni ktp.) aktivajn (transirajn) verbojn, ni uzas la sufikson **ig**: **timiĝas** lin = mi igas lin timi, mi faras (kaŭzas) ke li timu; same: mirigi, ridigi, promenigi ktp. En bulgara lingvo ni havas la respektivajn verbojn en aktiva formo: плаша, чюдя (очудвам), размивам, разхождам ktp.

Tamen mi devas fari averton: oni ne komprenu, ke ĝenerale ne estas kunigeblaj verboj kiel timi, miri ktp. kun la sufikso **ig**, alivorte ke ĉiu simila formaĵo devas esti traktata kiel erara. Fakte apud **timi** povas esti ankaŭ **timiĝi** (kvankam malofte), apud **koleri** — **koleriĝi** ktp., sed inter la du formoj estas diferenco: per **ig** ni esprimas en tiu ĉi kazo ne estantan travivatan staton, sed **ekeston** de tia stato, **transiron** en ĝin. Do: timi — **боя се**, timiĝi — **уплашвам се**, kolери — **ядосвам се**, сърдя се, kolериĝi — **разядосвам се**, **разсърдвам се**. La sencon de timiĝi, kolериĝi ni povus esprimi ankaŭ alimaniere: **ektimi**, **ekkolери** ktp.

En la fino mi faros komparon inter kelkaj bulgaraj propozicioj en kiuj estas uzataj **се**-verboj, kun iliaj Esperanto-tradukoj, por illustri kelkajn el la donitaj asertoj; por la celo mi prenas la verbon **виждам** — **vidi**:

Напрасно се мъчи да мине незабелязан — той **се вижда** от всички страни — Vane li penas (tra) pasi nerimarkite — **li estas vidata** (oni ĝi vidas lin) el ĉiuj flankoj.

В спомените си той **се вижда** малко момченце — En siaj rememoroj li **vidas sin** malgranda knabeto.

Тази работа **се вижда** по дозрителна — Tiu ĉi afero ŝajnas (aspektas, vidiĝas) **suspekt(ind)a**.

Вижда се, че не си работил с трион — Estas evidente (videble, klare), ke vi neniam laboris per segilo.

Вижда се, че никој не желае — Evidentas (estas evidente, ni vidas), ke neniu deziras.

Видя се, че няма друг изход — Evidentiĝis, ke alia solvo ne estas (ne ekzistas).

Kaj jen tri eblaj manieroj por esprimi unu penson:

Oni parolas Esperanton Esperanto estas parolata Esperanto paroliĝas	} en multaj landoj
---	-----------------------

Kiu el ili estas korekta kaj kiu ne? — Ni povas diri ke ĉiu el ili gramatike estas korekta. Sed se ni metus la demandon, kiu estas preferinda, senhezite ni povas elekti la du unuajn. Taksante la taŭgecon kaj preferindecon de similaj paralelaj esprimmanieroj ni povas trovi gvidon en du rilatoj: 1) Kiu el ili estas pli logika, aŭ, pli precize — kiu respondas al la nuanco, kiun ni deziras esprimi: ĉu resendecon aŭ pasivecon. 2) Kiu el ili en apudesto kun la ceteraj vortoj en la propozicio donas pli bonsonan, pli muzikan efekton, pli glatan kaj facilan elparoladon, sen amasiĝo de pluraj similaj sonoj unu apud alia (principo de eŭfonio, kiun, bedaŭrinde, multaj ne atentis, konstruante frazojn en Esperanto).

ADA



VALORA KONTRIBUO

La Fremdlingva Eldonejo en Hanojo eldonis en Esperanto vicon da valoraj kaj interesaj libroj pri la heroa batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usonaj imperiistoj. La vjetnamaj esperantistoj donas imitindan ekzemplon, kiel ili batalas kontraŭ la agresuloj ne nur per pafilo en mano, kiam estas necese, sed ankaŭ uzante la internacian lingvon por defendi sian justan aferon — la liberecon, la sendependecon kaj la unuecon de sia belega patrujo.

Dum 1965/66 aperis:



Meze de l' homoj — Tekstoj de diversaj aŭtoroj;

Prezidanto Ho-Chi-Min — Respektinda gvidanto de la vjetnama popolo;

Tiel li vivis. Laŭ la rakonto de la vidvino Fan Thi Kujen, kolekto de Tran Dinh Van;

La fajra elprovo, kolektiva verko, tradukis Minn Kinh;

La gaseskalado (Artikoloj);

Ankoraŭfoje ni venkos de generalo Vo Nguyen Giap.

Havigu al vi, legu kaj disvastigu la eldonaĵojn de la Fremdlingva Eldonejo en Hanojo! Ni varme rekomendas ilin.

Esperantista societo „Nova Stelo“, urbo Panagjuriŝte, organizas Esperantan Novjaran letervesperon 1967. Ĉiuj, kiuj sendos ilustritajn poŝtkartojn, ricevos nesubskribitajn poŝtkartojn, kiuj prezentas heroojn el la Aprila Ribelo kaj nnu poŝtkarton el Panagjuriŝte. Por plej belega ilustrita poŝtkarto ni sendos ankaŭ unu suve-

niron, kiu prezentos la Grandan Aprilan Epopon,

Ĉiujn poŝtkartojn oni devas sendi ĝis la 28-a de decembro 1966. Nia adreso estas:

Panagjuriŝte, str. Rajna Knjaginja 32, Esperanto-societo „Nova Stelo“, junulara sekcio, Jordan Nikolov.

En ĵurnalo „**Iskârska komuna**“ — Mezdra (24. XI. 1965, 8. I. 1966, 5. II. 1966) — „Per Esperanto tra la frataj socialismaj landoj“ — vojaĝnotoj de A. Anĉev.

En ĵ. „**Avtostroitel**“ — Ŝumen (29. XII. 1965) — artikolo de G. Moskov „Agrablan vojaĝon — novjara letero“ (rakonto pri la amikeco inter Zorka Jankova kaj la hungaroj Aŭgusto Tibor kaj Jozef Gabor el urbo Szolnok).

En ĵ. „**Dunavska pravda**“ — Ruse (18. I. 1966) informo de J. Kalinov „Honore al la heroo - antifaŝisto“ (rakonto pri Petr Kirjakov el vilaĝo Ŝtrâklevo, kie la E-societo portas lian nomon).

En ĵ. „**Danuba stelo**“ — Ruse (1. IV. 1966). „Agrablan vojaĝon, festivalanoj“ — informo de J. Kalinov pri la partopreno en la Festivalo en Loveĉ de esperantistoj el Ruse.

En ĵ. „**Rodopski ustrem**“ — Smoljan (2, 5, 7, 12. IV. 1966) — „Du monatojn en Japanio“ (vojaĝimpresoj) de Petr Pamporov.

En ĵ. „**Veĉerni novini**“ — Sofio (21. IV. 1966) — informo „Per Esperanto ĝis Japanio“ (pri la prelego de Neli Abaĝieva, kiun ŝi faris en Dimitrovgrad).

En la sama ĵurnalo (25. IV. 1966) — anonco pri vespero de la turistoj-esperantistoj kun projekcio de turismaj filmoj.

En ĵ. „**Dobruĝanska tribuna**“ — Tolbuĥin (12. V. 1966) — informo ke la junaj esperantistoj de Tolbuĥin gajnis la trian lokon en la Festivalo en Loveĉ.

En ĵ. „**Dunavska pravda**“ — Ruse (17. VI. 1966) — informo pri la agado de la turista sekcio „**Esperanto**“ en Ruse.

En ĵ. „**Haskovska tribuna**“ — Haskovo (7. VII. 1966) — informo de J. Zaprjanov, ke en Dimitrovgrad oni pridiskutis la decidojn de la Nacia E-konferenco kaj ke la Distrikta fako de popola klerigo malfermis kursojn por instruistoj de Esperanto en Haskovo kaj Dimitrovgrad.

En ĵ. „**Dimitrovgradska tribuna**“ — (7. VII. 1966) — informo de J. Zaprjanov ke en Dimitrovgrad la esperantistoj okazigis kunvenon kun raporto de N. Aleksiev pri la decidoj de la Nacia E-konferenco.

En „**Zarja na komunizma**“ — Loveĉ (14. VII. 1966) — informo de I. Ivanov — „Plimultiĝas la vicoj de la esperantistoj“, ke okazis kunveno dediĉita al Uzbekio kaj ke la novaj esperantistoj ricevis atestojn pri sukcesa finiĝo de E-kurso.

En ĵ. „**Veĉerni novini**“ — Sofio (18. VII. 1966) — informo de Ĥr. Dimov pri la kongreso de STELO en Ruse.

En la sama ĵurnalo (25. VII. 1966) — informo „La bulgaraj esperantistoj kaj la Universala E-kongreso en Budapeŝto“.

En ĵ. „**Rabotniĉesko delo**“ — Sofio (5. VIII. 1966) — artikolo de N. Abaĝieva — „Neniam plu Hiroŝima“ kaj Nagasaki!“

En la sama ĵurnalo (6. VIII. 1966) — informo „La esperantistoj batalas por paco“ (pri la IV konferenco de MEM en Budapeŝto).

En la sama ĵurnalo (9. VIII. 1966) — informo „Antaŭ la Unua kongreso de STELO“.

En la sama ĵurnalo (11. VIII. 1966) — informo „La Unua kongreso de STELO“.

En la sama ĵurnalo (12. VIII. 1966) — informo „La Unua Tutmonda Studenta E-kongreso“.

En la sama ĵurnalo (13. VIII. 1966) — informo „Unua Tutmonda Studenta E-kongreso“.

En la sama ĵurnalo (14. VIII. 1966) — informo „Unua Tutmonda Studenta E-kongreso“.

En la sama ĵurnalo (15. VIII. 1966) — informo „Finiĝis la Unua Tutmonda Studenta E-kongreso“.

En ĵ. „**Dunavska Pravda**“ — Ruse (10. VIII. 1966) — La tuta kvara paĝo estas dediĉita al la kongreso de STELO en Ruse kun tre varia materialo.

En la sama ĵurnalo (11. VIII. 1966) — informo de V. Petrov pri la kongreso de STELO en Ruse.

En ĵ. „**Narodna mladej**“ — Sofio (12. VIII. 1966) — „Studentoj el 14 landoj konversacias sen tradukistoj“ — informo pri la kongreso de STELO en Ruse.

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (12. VIII. 1966) — informo „En Ruse kunsidas la I-a Tutmonda kongreso de la Studentoj-esperantistoj“.

En la sama ĵurnalo (13. VIII. 1966) — „En atmosfero de reciproka fideleco kaj frata interkompensiĝo“ — informo pri la Studenta E-kongreso en Ruse.

En la sama ĵurnalo (14. VIII. 1966) — du informoj — „Esperanto kaj la paco“ (informo pri la kongreso en Ruse) kaj „La Bulgara E-Teatro en Budapeŝto (pri la spektakloj de la Teatro en Budapeŝto).“

En la sama ĵurnalo (17. VIII. 1966) — „En la nomo de la amikeco“ (lasta informo pri la kongreso de STELO en Ruse).

Studento, informilo dumonata interuniversitata de STELO, Speciala kongresa numero — kun plej diversaj informoj.

На 10. VIII. 1966 г. след пресконференцията в хотел „Дунав“ във връзка с I-ия световен студентски есперантски конгрес група конгресисти от различни страни присъствуваха на откриването на новия автотранспортен есперантски клуб в центъра на града. За целите и задачите на специализираните есперантски организации по места и в международен мащаб говори др. Йордан Димитров, секретар на Автотранспортното есперантско дружество „Д-р Заменхоф“ — Русе. Той изтъкна, че автотранспортните работници-есперантисти по

места и в международен мащаб започват да работят под девиза: „Шосетата и мостовете свързват бреговете и страните, а есперанто — хората и народите“. Пред присъстващите бе изнесена кратка художествена програма. Тържеството бе поздравено от делегати от Франция, СССР, Румъния и Унгария, както и от председателя на ОК на БЕС др. Хр. Христов. Бяха вдигнати тостове за дружба чрез есперанто и за мира в света.

Й. Димитров

IVAN HARALAMPIEV KRESTANOV

La membro de la Internacia Esperanta Akademio, unu el la unuaj kaj plej grandaj, aktivaj agintoj de E-movado en nia lando, multjara tre agema kaj entreprenema sociulo, kapabla gimnazia instruisto kaj nelacigebla eldoninto Ivan Haralampiev Krestanov mortis en Sofio la 4-an de septembro 1966, post mallonga malsaniĝo je 76-jara aĝo. Kiel scivolema junulo de malriĉa familio komence li estis tornisto, librotenisto kaj desegnisto. Li finis gimnazion en Bulgario, studis filologion kaj diplomation en Parizo, Dresden kaj Sofio. . .

Li estis unu el la unuaj bulgaraj esperantistoj, kiu eldonis lernolibron en Esperanto, aprobitan de la Ministerio de la popola klerigo, Bulgaran antologion (prozo kaj poezio en Esperanto) el kiu oni tradukis en

multajn lingvojn eĉ en ĉinan lingvon. Tiu ĉi granda libro, multaj liaj plej diversaj artikoloj presitaj en la tutmonda esperanta gazetaro, la grandega nombro da prelegoj en Esperanto kiujn li faris en tuta Eŭropo kontribuis multon por la konigo de la mondo kun la vivo kaj la kulturo de nia popolo.

En 1927 j. li reprezentis la bulgarajn esperantistojn en la internecia kongreso de la laborisfoj esperantistoj.

En daŭro de pli ol dudek jaroj li vizitis preskaŭ ĉiujn eŭropajn landojn, parton de Azio kaj Afriko. Pli ol 28 jarojn li laboris en la kampo de la klerigo, en Ministerio de la eksteraj aferoj, en aliaj ŝtataj organoj. kaj en la Libera Universitato en Sofio. Li redaktis multajn revuojn. Li ankaŭ fondis kaj redaktis la konatan „Bulgara Esperanta Biblioteko“.

La Estraro de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, en la nomo de la bulgara esperantistaro, esprimas siajn profundajn kondolencojn okaze de la forpaso de la prezidanto de Federacio Esperantista Itala — grafo

adv. **BARBIELLINI-AMIDEI ADEMARO**. Kun lia morto la tutmonda Esperanto-movado perdis unu sindonan, fervoran kaj senlacan adepton de la instruado de D-ro Zamenhof.

DEZIRAS KORESPONDI

Brazilio

Jacques Auguste Corbet (40-jara), Praia do Flamengo, 254-Apto. 404-Flamengo-ZC-01 — Rio de Janeiro, G. B. — dez. interŝ. p. m. kun ĉl.

Bulgario

Radka Petrova (26-jara), bulv. Lenin 41, Sofio — kun ĉl.

Krasimira Ilieva (22-jara), str. Neofit Rilski 44, Sofio — kun ĉl.

Jordan Jordanov, bulv. Lenin 60, Smoljan — kun ĉ. l. pri ĉt.

Dačo Dinev Tonev (40-jara kontisto), Radnevo, St. Zagorsko — interŝanĝas BK, leterojn kun la tm.

Georgi Mirčev (26-jara), ul. Ĉerno more 11, Loveĉ, dez. kor. kun ĉl pri ĉt.

Nikola Gjurnev (23-jara), v. Baldevo, Blagoevgradsko — interŝanĝas pri sporto, moderna muziko, gr. diskoj, pm, pk, fotoj.

Penjo Genev Kartelov, (teknikisto, junulo), Zl. Dol, Marica.

Tončo Gogov (junulo, teknikisto), v. Konstantinovo, Haskovsko.

Milčo Georgiev (26-jara), Pirdop, F. Z. S., bl. 4, deziras kor. kun ĉ. l.

Kiril Aprilov (32-jara), instruisto, Kulata, Blagoevgradsko, deziras korespondi kun la tuta mondo.

30 esperantistoj dez. korespondi kun ĉ. l. Skribu al: Mezdra, E-societo „N. Vapcarov“.

Esperantistoj de 16—50 jaroj, dez. kor. kun ĉl. Skribu al: Nejko M. Nejkov, str. Ivan Vladkov 21, Drjanovo.

Ĉeĥoslovakio

Borii Josef, Prazska 9, Hradec Králové IV — kun bulgaroj.

Nikola Anikó (22-jara redaktorino), Adr.: Redakcia: Kis Eptö, Prazská 9, Bratislava, dez. kor. kun japanoj kaj sudamerikanoj.

J. E. Moravec, 11 u Druzstva ideál, Praha 4.

Lubor Kovár (teknikisto), Lázně Belohrad II/44, dez. kor. kun samideanoj, interŝ. pk., fotojn, alometetikadojn, interes. pri turismo, aŭtomobilismo.

Germanio

Gertraude Baldauf (37-jara), 90 Karl-Marx Stadt, Paul Matz str. 13, dez. kor. mondscale.

H. H. Bein (22, 33-jara, geedzoj), 410. Schochwitz — kun bulg. de Nigra marbordo, pm kaj gramofondiskojn.

Greklando

Junaj grekaj gesamideanoj deziras korespondi kun bulgaraj gejunuloj pri ĉiuj temoj:

F-ino Meri Rela (22-jara), Agriniu 4, Ateno 821.

F-ino Rena Rela (18-jara), Arginiu 4, Ateno 821.

S-ino Ditsa Fabri (28-jara), Sozopoleos Aharon, Ateno.

F-ino Ana Sarafina (22-jara), Simis 7 Aharon, Ateno.

F-ino Hrisula Kalama (22-jara), Tzavela 17 Holargos, Ateno.

S-ro Alexandros Vlahopoulos (25-jara), Patision 71, Ateno.

S-ro Atanasios Vasilakopoulos (35-jara fraŭlo), 28 Patision, Ateno.

S-ro Erikos Babasis (35-jara fraŭlo), Stadiu 35, Ateno.

S-ro Emanuil Jiorjatsos (26-jara), Evripidu 52, Ateno.

S-ro Antonis Sturaitis (18-jara), Imvru 2, Patision, Ateno.

Hindujo

Esperanta Filatela Servo, PB 604, New Delhi. Ni bezonas P. M., unuataĝajn kovertojn (FDC-first day cover) el ĉiuj landoj, interŝanĝe — aŭ favore al la E-movado en Hindujo.

Hungario

24 geesperantistoj, diversaĝaj, deziras korespondi kun bulg. Adreso: Fervojista Fakgrupo de Hungara E-Asocio „Vasutas Szakcsoportha, Kiskunhalas.

Gábor Kivác (17-jara, lernanto), Brany János 18 Kiskunhalas, dez. kor. kun bulgaroj; kolektas BK., PM., gazetojn.

Miklós Kardos (16-jara, studento), Bocskai u. 6, Szeged — dez. kor. kun bulgara junulo; kolektas pm.

Pervojista Fakgrupo de la Hungara E-Asocio, Magyar Esperanto Szövetség Vasutas Szakcsoportha Kiskunhalas — dez. ĝemeliĝi kun iu bulgara E-klubo. Interŝ. E-librojn, gazetojn, vizitojn dum la somero.

Alfonz Moró (26-jara fervojisto), Mártírok u. 42. V/5, Pécs, dez. kor. kun bulgaraj junuloj, laŭeble kun geedzoj.

Jugoslavio

Pejčića Miladin (24-jara, maŝina teknikisto) Svetozarevo, kol. Djurdjevo Brdo 18 — dez. kor. kun geamikoj kun sama profesio.

Kubo

Pedro Pablo Jamas, Giego de avila, E. Marmol 72-E.

S-ro Rufino Abreu Garcia, Giego de avila,

Joaguin Auero 257-Oeste.

Fino Dorkas Daniel Daniel, Giego de avila, Soto 212-sur.

Fino Isabela Hida Mese, Giego de avila, Carretera Central 118-Oeste.

Pollando

Maria Wronska, Krakow, ul. Rylla 7/21.

Laborejo Esperanta „Anika servo“, s-ano Jozef Rogowski, Zawidów, ul. Wilcza 2-b.

Danuta Sliwinska (16-jara lernantino), ul. Lidzbarska 16, Brodnica, dez. kor. kun bulgarinoj; interesiĝas pri filmoj, sporto, muziko; kolektas PM., BK., fotojn de filmaktoroj.

Z. S. Czesnowicz (30-jara, teknologo), str. Czerwonyh Kosynierów 11/9, Gdynia 1, dez. kor. kun bulgaroj; interŝ. PM., esp-ajojn, PK.

60 komencantoj gelernantoj el Technikum Spozwoze, str. Klonowa 2, Zabrze, dez. kor. kun la t. m.; interŝ. BK. kaj PM., per instruistino R. Rokicka.

80 komencantoj gelernantoj, E-grupo, Ekonomia Teknika Lernejo, pl. Traugutta 1, Zabrze, dez. kor. kun ĉl.; interŝ. BK., PM.

Maria Rygielska (19-jara), str. Lukaszewicza 1/107, Bydgoszcz 10, kun bulgaroj, precipe el Sofio kaj Varna.

Wieslaw Hryniewicz, Zielona Gora, ul. Jedności — robotniczej 72/4, dez. kor. precipe kun bulgaroj.

Janina Wierzchowska (oficistino-bibliotekistino), Sandomierz, str. Ogrodowa 10 m. 15, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

Ĉiumonate aranĝas letervesperojn 400-membra Wroclava E-klubo, Wroclaw-17, str. Dubois 3, Malsupra Silezio, deziras korespondi pri turismo, E-movado kaj E-literaturo. Kolektas bildkartojn.

Urszula Malinowska (18-jara studentino), Wroclaw, str. Tr. Nullo 21/1, deziras kor. kun ĉl. Kolektas BK-n.

120 gelernantoj de Energetika Teknikumo, Wroclaw, str. Bosak Haukego 21, dez. kor. kun ĉl.

30 lernantinoj de II-a Pedagogia Mezlernejo, Wroclaw, str. Czeska 2, Pollando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

80 lernantinoj de III-a Pedagogia Mezlernejo, Wroclaw, str. Swierczewskiego 27, dez. korespondi kun ĉl.

40 lernantinoj de Ekonomia Mezlernejo, Wroclaw, str. Worcella 3, dez. kor. kun ĉl.

Rumanio

Tudor Ștefan, str. Bolintineanu 28, Bailesti, Oltenia, dez. interŝ. pm., bk., gramofondiskojn kun ĉl.

Nikolae Cara (studento), str. Stelutei 33, Bukaresti 26, dez. kor. kun la tm. pri sporto, aviado kaj diversaj temoj per bk. aŭ leteroj, interŝanĝi revuojn, librojn ktp.

Enache Elisabeta, str. Piata Unirii 1, Sibiu, dez. kor. kun ĉl.

USSR

Viktor Kaplin (37-jara ĵurnalisto), Ukraina SSR, Kiev — 67, ul. Zapadnaja 12, kv. 30 — dez. kor. kun bulgaroj pri diversaj temoj.

Jundulas Pranas (17-jara — lernanto) Alsedziai, kol. „Taika“, Plunges raj. Litovio — dez. kor. kaj interŝ. pk. pm. kun ĉl.

C. Breslav, Leningrad c-177, Krasnoarmejskaja 67, kv. 1 — dez. kor. kun Islando, Irlando, Malta, Kipro, Azio, Afriko, Suda Ameriko.

D-ro Vladimiro Sekirin (28-jara), Kosmonavton 22, kv. 23, Dimitrovo, Moskva distr. — interesiĝas pri medicino, muziko, literaturo, filatelio, ilustr. PK.

Okaze la 50-jaran jubileon de la Granda Oktobra Revolucio kaj 40-an jubileon de rusa esperantisto-filatelisto Aleksandr Danilov estos preparata ekspozicio „Esperanto kaj filatelio“. Estas dezirataj salutleteroj kaj donacoj por la ekspozicio-grandformataj poŝtmarkoj, koloraj il. p. k., alumetikedoj k. a. Avertu al alilandanoj — p. m. sendu per: Bulgario, Sofio, Bulg. E-Asocio, p. k. 66. La aliajn ovjektojn sendu rekte al USSR, Sevastopol, postrestante, Aleksandr Danilov,

Instruistoj-esperantistoj de la tuta mondo, sendu salutleterojn, ilustritajn poŝtkartojn, fotojn, librojn, gazetojn, magnetofonajn bendojn kaj alian interesan artecan materialon por E-ekspozicio kiu okazos dum la festo nomita „Tago de la instruistoj“.

Ĉio estos danke rekompencita.

Nia adreso: Sovet-Unio, Omskaja obl. Muŝoncovo. Romo.

Jefim Bogomolny, Matrosova 7, Kolomna-Moskovska oblastj.

Fratinoj Alla kaj Valja Besselova, Leningrad D-40, do vostrebavaniya — dez. interŝ. kun t. m. alumetikedojn, fotojn de filmaktoroj, longedaŭrajn gramofondiskojn k. a.

Aurica Negritu, pr. Lenin 194 n-ro 3, Kiŝinevo, Moldavio, dez. kor. je diversaj temoj kun Rumanio, Francio kaj Italio.

Nataša Roška (20-jara studentino), pr. Lenin 194 n-ro 3, Kiŝinevo, Moldavio — dez. koresp. kun t. m. je diversaj temoj.

Atentu, filatelistoj! S-ano Ivan Šavkun, Gorkij — 41, ul. Obnorskogo 23-7, deziras interŝanĝi p. m. kun la t. m. Anonceto validas ĉiam.

Loktionov A. J., Soĉi, Adlerskij r-on, Ĉajso-vňoz, 1-oe otdelenie, deziras korespondi kun Hindujo, Hungario, Britio.

20 anoj (diversaĝaj) de E-rondo, park im. Lenina, Ĝambul, Kazahstan — dez. korespondi kun ĉl.

Barčevski Ivars (24-jara), K. Marksa — 44, Lubni, Ukraino, dez. korespondi kun samaĝuloj

precipe el Francio, Svedio, Norvegio, Ameriko kaj Aŭstralio.

Oŝkinis Algimantas (17-jara), Kaŭnas — 2, Malnikaitės 148-3, Litovio, interesiĝas pri radiotekniko, sporto, kolektas, p. m.

STATA KOMBINUMO POR KONSERVAĴOJ „DUNAVIJA“

urbo R U S E

Telefonoj: 26-67, 29-73

Centralo: 27-98, 41-93

PRODUKTADO de

legomaj kaj fruktaj konservaĵoj,
konservaĵoj el viando kun legomoj,
tomatkaĉo, sekigitaj fruktoj, legomoj k. a.

por

la

enlanda kaj la eksterlanda merkatoj.

EKSPORTFIRMO „BULGARKONSERV“, SOFIA




AKUMULILA UZINO „METODI ŠATAROV“ en urbo PAZARĜIK

Produktaĵoj kaj proponas akumulilajn bateriojn „Iskra“ — specialajn bonkvalitajn, kiuj kontentigas la laborantajn maŝinojn tiel en tropikaj, kiel ankaŭ en arkতিক kondiĉoj.

Serĉu la akumulilajn bateriojn „Iskra“, fabrikatajn de altkvalita plumbo, speciale rafinita por akumulila produktado.

Serĉu la bateriojn ĉe la Ekstera Komerca Entreprenejo „Elektroimpeks“ kaj ĉe la Komerca Entreprenejo „Maŝinoeksport“, Sofio — Bulgario.



Teksto: Nikola J. Vapcarov

Muziko: Dim. Denčev

Dum vi - a dorm' mi ve - nos i - u - fo - je sam - ki - el gast' ne -
 Sen - bru - e'en - t - ros mil - de mi ek - si - dos o - ku - lojn fik - sos sur
 a ten - di - ta fo - ra. Ne la - su min eks - te - re sur la vo - jo, ne
 vi kun ad mi ro kaj lon - ge ri - gar - dan - te vin a - vi - de mi
 re - glu vi la por - don, Ne la - su min eks - te - re sur la vo - jo ne
 ki - sos Vin
 rig - lu vi la por - don! pos - te mi fo - ri - ros kaj lon - ge ri - gar -
 dan - te vin a - vi - de mi ki - sos vin pos - te mi fo - ri - ros.

Dum via dorm' mi venos iufoje
 samkiel gast' neatendita, fora.
 Ne lasu min ekstere sur la vojo —
 ne riglu vi la pordon!

1942


Senbrue enirinte, milde mi eksidos
 okulojn fiksis sur vi kun admiro.
 Kaj longe rigardinte vin avide,
 mi kisos vin kaj poste mi foriros.


Tradukis: S. M. Simeonov

ŜTATA EKONOMIA ENTREPRENEJO „FAZAN“ — RUSE

produktas ĉiujn specojn de ŝtrumpoj —
 virinaj, viraj kaj infanaj de kreplilono
 kaj kotono.

Serĉu la altkvalitajn ŝtrumpojn proponatajn
 de ŜEE „Fazan“ — RUSE.





Fabrikado de:

1. Furaĝmuelilo DKU-M — 1,2
2. Euraĝmuelilo F-1 — 1,5
3. Irigaciaj pluv-ŝprucigiloj „Marica“ 45
4. Irigaciaj pluv-ŝprucigilaj instalaĵoj „Marica“ 45
5. Maŝinoj kaj ekiparo por geologi-esplora industrio.

За 1967 година чрез съюза може да станете член на Световния есперантски съюз (UEA), като изпратите следните суми:

а) Membro-Abonanto (MA)

(над 25-годишна възраст)

получава „Jarlibro“ и сп. „Esperanto“

15.00 лв.

б) Membro kun „Jarlibro“ (MJ)

(над 25-годишна възраст)

получава само „Jarlibro“

8.00 лв.

в) Juna Membro-Abonanto (J-MA)

(до 22-годишна възраст)

получава „Jarlibro“, сп. „Esperanto“

и сп. „Kontakto“

12.00 лв.

г) Juna Membro-Abonanto kun Jarlibro (J-MJ)

(до 22-годишна възраст)

получава само „Jarlibro“

4.00 лв

д) Membro-Abonanto kun „Kontakto“ (MA-K)

(от 22—25-годишна възраст)

получава „Jarlibro“, сп. „Esperanto“

и сп. „Kontakto“

15.00 лв

е) Membro kun Jarlibro (MJ)

(от 22—25-годишна възраст)

получава само „Jarlibro“


8.00 лв.

Сумите да се изпращат с пощенски запис до съюза, п. к. 66, София, като изрично се упомене за какво се изпраща сумата. Също трябва да се съобщят точните дати на раждане с оглед 1967 година във връзка с членуването на младежите в UEA.

КРАЕН СРОК ЗА ИЗПРАЩАНЕ НА СУМИТЕ — 15 ДЕКЕМВРИ 1966 ГОДИНА

Абонирането за сп. „Bulgara Esperantisto“, „Nuntampa Bulgario“, „Ripozoj“, „Paco“, „Internacia Ĵurnalisto“ за 1967 год. ще става пак във всички местни клонове на РЕП. Дружествата да развият активна дейност по набиране на нови абонати, като своевременно вземат кочани от РЕП. Абонаментите остават същите (Справка каталога на РЕП).

ŜTATA METALURGIA UZINO POR MIKROTELFEROJ —
urbo GORNA ORJAĤOVICA



fabrikas jenajn
elektrotelferojn:

- a) ĉenajn — 125, 250 kaj 500 kgr
- b) kablajn — 200, 400 kaj 800 kgr
- c) vinĉojn kun helicoidaj dentradoj 1, 2, 3, 5
kaj 10 t.

Eksportfirmo: Ŝtata Komerca Entreprenejo

„BALKANKAR“ — Sofia

Tel. 8-53-25



ИЗЛЕЗЕ ОТ ПЕЧАТ

ЕСПЕРАНТСКА ГРАМАТИКА

от В. Олянов и К. Вълев

издание на ДИ „Наука и изкуство“

Цена 0,62 лв.

Книгата се доставя от книжарниците на ДТП „Печатни произведения“ и на Българската есперантска кооперация, бул. Витоша № 40, София.

Граматиката е необходимо помагало за всеки есперантист. В нея ще намерите отговор на всички въпроси от есперантската граматика, които ви интересуват във връзка с изучаването на езика.

UZINO POR FERFADENE-FORTIKIGITAJ BETONFABRIKAĴOJ

„G. TERZIEV“ — urbo SVIŠTOV


Direktoro — 423

Telefonoj:


Debitejo — 380

PRODUKTADO DE:

ŝpaloj el betono plifortikigita per antaŭe maŝine streĉetenditaj ferfadenoj; centrifugaj kaj vibrobetonaj fostoĵoj por elektro- kaj telefonretoj; ferbetonaj fostoĵoj, duontuboj por la grundpliboniga konstrutekniko, palisoj por vitkampoj kaj ĉirkaŭtariloj; elementoj por la konstrutekniko, kaj aliaj betonaj kaj ferbetonaj produktoj.




La instalaĵo por fabrikado de ŝpaloj estas ellakrita laŭ bulgaraj projektoj kaj per bulgaraj maŝinoj, kies produktadpovo estas mezkvante 880 ŝpalojn dum unu tagnokto.



La alta kvalito, longdaŭreco kaj fortikeco estas karakterizaj indicoj por la fabrikaĵoj de la Uzino.

La Uzino akceptas mendojn el la tuta lando.

ŜTATA ENTREPRENEJO POR AĈETADO KAJ VENDADO DE CEREALOJ
„BLAGOJ KASABOV“ URBO VARNA



AĈETAS, KONSERVAS, PRILABORAS KAJ VENDAS
ĈIUJN SPECOJN DE CEREALOJ;

PRODUKTAS altkvalitajn farunojn;
KOMERCAS per ĉiuspecaj cerealoj,
mueleblaj produktoj kaj
furaĝoj

POR LA ENLANDA KAJ LA EKSTERLANDA MERKATOJ.

Bonvolu aĉetadi el la fajnaj farunoj kaj
grennutraĵoj de la Enteprenejo „Blagoj Kasabov“

— VARNA.


Telefonoj:

Direktoro	— 24-26
Fako Debito	— 58-30
Ĉefkontisto	— 39-04
Ĉefingénieur	— 37-37

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Dimitr ĴDRAKOV, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV,
Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV
Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 3-26-82

**ŜTATA EKONOMIA UNUIĜO „PRIBOROSTROENE“ (KONSTRUADO
DE INSTRUMENTOJ)—UZINO POR HORLOĜINSTRUMENTOJ — Gabrovo**

PRODUKTADO DE:



**RELAJSO POR TEMPO — tipo
PVM-6 kaj PVC-20**

Tiu ĉi speco de relajso estas desti-
nita por kelktempa elŝalto aŭ ŝalto de
elektroaparatoj, al kiuj estas agordita
la relajso.

a) Tipo PVM-6 funkcias je kvin
ampleksoj: 0 ĝis 6 sek.
0 ĝis 60 sek.
0 ĝis 6 min.
0 ĝis 60 min.
0 ĝis 6 horoj.

Nombro de la direktantaj ĉenoj de 1 ĝis 4

Gabaritaj dimensioj = $174 \times 83 \times 117$ mm.

b) Tipo PVC-20 — Tempo por ŝalto kaj elŝalto de 0 ĝis 20 sek.

Nombro de la direktantaj ĉenoj — 2. Gabaritaj dimensioj = $95 \times 65 \times 85$ mm.




TAKSIMETRO — Tipo K-1A

destinita por aŭtomata kalkulado de
la sumo por traveturita vojo kaj halto-
tempo de la taksio.

La taksimetro kalkulsignas:
sume — la kilometrojn,
la pagitajn kilometrojn,
la pagendan sumon
la ofican sumon (kason).

Gabaritaj dimensioj:

$150 \times 116 \times 134$ mm.



ŜTUPAREJA AŬTOMATO — Tipo ASĈ

destinita por ekŝalto kaj elŝalto de
la lumiga elektroinstalaĵo de la ŝtupa-
rejo de kooperaj loĝdomoj, ŝtataj in-
stitucioj k. a.

Tempo por elŝalto = regulebla
de 2 ĝis 5 min. Gabaritaj dimen-
sioj = $100 \times 156 \times 62$ mm.

**EKSPORTFIRMO:
„ELEKTROIMPEKS“**

Sofio

